

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 531

JANUARO 1950

INVITO AL CIELO

de

JAMES D. SAYERS

Finfine aperis la jam malpacience atendita originala romano en plaĉa vesto.

La konata aŭtoro skribis utopian manuskripton, kiu kelkfoje forrabas la spiron de la leganto, kaj kiu tamen ĉiam pripensigas lin pri la problemoj ekskuontaj la homaron. Sensacia libro, kiu sendube trovos siajn tradukantojn por naciaj lingvoj.

205 paĝoj, blanka papero, duontole bindita, multkolora ŝirmkovrilo.

Prezo : 15 ŝilingoj, afranko 6 penceoj.

Eldonita de
SIEGFRIED ZIEGLER ELDONEJO (ESPERANTO-FAKO),
München-Pasing, Germanujo.

Mendu ĉe
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

MOMENTON, MI PETAS

^A Ĉu vi scias . . .

- ke U.E.A. estas la unusola Esperantista organizaĵo internacia, kiu sin okupas nur pri la progresigo de Esperanto, klopodante varbi ĉiujn homojn por la lingvo, sen konsidero pri iliaj opinioj religiaj, politikaj aŭ kiaj ajn, tiel plugante la grundon, kies rikolto estas disponebla ankaŭ por la tuta movado kaj precipe por la fakaj movadoj ?
- ke la ĉiujara **Universala Kongreso**, organizata de U.E.A. estas unu el la plej imponaj demonstracioj de la praktika apliko de Esperanto, kaj la **Internacia Somera Universitato** en ĝia kadro senegala manifesto de la kultura rolo de nia lingvo ?
- ke la pli ol 2000 **delegitoj de U.E.A.** (kun adreso en la Jarlibro), kiuj donas siajn servojn al siaj kunmembroj—ĉu persone dum vizito, ĉu koresponde—estas io unika en la mondo kaj pruvas ankoraŭfoje la solidaron de la Esperanta familio ?
- ke U.E.A. jam eldonis **dek teknikajn terminarojn** (kaj projektas pli en la dua parto de sia Jarlibro)—el kiuj ĉerpas la diversaj naciaj kaj internaciaj Esperanto vortaroj—kaj tiel faras gravan kontribuon al la lingvo-evoluo, kiun ne povus fari privataj eldonistoj ?
- ke U.E.A. proprainciante subtenas la **eldonon de ŝlosiloj kaj lernolibroj** en landoj, kie la movado mem ne kapablas fari tion, kaj per tio helpas al la disvastigado de Esperanto en malproksimaj partoj de la mondo ?
- ke U.E.A. konstante iniciatas novajn klopodojn penetri en oficialajn rondojn kaj rajte fieras pri sia kunordiga rolo en la **Petskriba kampanjo**, kiu rezultigis la gigantan ciferon 16,350,212 da subskriboj apogantaj la insiston, ke U.N. konsideru la pretendojn de Esperanto ?
- ke U.E.A. eldonas ĉiumonatan gazeton *Esperanto*, kiu estas modelo de lingvo kaj stilo, kaj informas pri ĉiuj fazoj de la movado, kaj kiun oni esperas pligrandigi kaj plibonigi en la baldaŭa estonteco ?
- ke la Landaj Esperanto-Asocioj en la jenaj landoj aliĝis al U.E.A. kaj iliaj membroj pro tio estas Asociaj Membroj de U.E.A. :

Argentino, Aŭstralio, Belgujo, Brazilo, Britujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Danlando, Francujo, Italujo, Jugoslavujo, Nederlando, Norvegujo, Novzelando, Pollando, Svedujo, Svislando, Usono; kaj sekve tiuj Asociaj Membroj rajtas uzi la servojn de la delegitoj ?

ke la **Libroservo de U.E.A.** peras ĉiujare 20,000 librojn kaj portas konstantan stokon de 4,000 volumoj de ĉiuj haveblaj verkoj, kies detaloj troviĝas en la Jarlibro aŭ estas riceveblaj aparte kontraŭ peto ?

ke ĉio tio meritas la aktivan subtenon de ĉiu serioza Esperantisto, kaj tial U.E.A.—jam la plej granda Esperantista organizaĵo en la mondo—varme invitas vin realigi kiel **Individua Membro** (kiu ricevas la revuon *Esperanto* kaj/aŭ la Jarlibron) por ke ĝi povu daŭrigi sian laboron helpe al la tuta Esperantista movado ?

Individuaj Membroj—Aldone al la granda nombro de Asociaj Membroj, U.E.A. havas kelkajn milojn da **individuaj membroj**, kies aktiva kaj financa subteno formas la konkretan bazon de ĝia praktika laboro.

Delegitoj—En sesdeko da landoj pli ol 2000 **delegitoj** donas al la Asocio siajn servojn por la bono de la movado. Tiom da energio disperdiĝas pro manko de kunordiga direktado, ke ni rajtas taksu ĉi tiun oferon de la gesamideanoj efektive objektiva kaj praktika esprimo de la fervoro kaj entuziasmo, kiujn sentas ĉiu sincera Esperantisto. Tiuj samideanoj respondas al informpetoj de la membroj kaj helpas ilin dum vojaĝo.

La Jarlibro—Aperas en du partoj; la unua parto en la printempo kun detala informo pri la Delegitoj tra la mondo, pri la Esperantistaj organizaĵoj, eldonaĵoj, gazetoj k.s. kaj multaj aliaj aferoj, kiujn koni devus ĉiu Esperantisto. La dua aperas en la aŭtuno kun informoj pri ŝanĝoj en la Delegitaro kaj kun, kutime, nova **fakterminaro**. La Jarlibro de U.E.A. estas altvalora konsultilo por la praktika Esperantisto.

Esperanto—estas la oficiala organo de U.E.A. Ĝi kutime aperas en la unua semajno de la monato. En ĉiu numero troviĝas interesaj artikoloj kaj lastaj novaĵoj el la tutmonda movado.

Kotizoj 1950 !—Por evitigi al vi interrompon en la regula liverado de la gazeto, kaj por helpi la administradon en la Centra Oficejo, bonvolu pagi vian kotizon kiel eble plej baldaŭ. Antaŭdankon.

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

43a JARO Januaro 1950

N-ro 531 (1)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro :
HANS JAKOB

Helpredaktoro
MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO

Palais Wilson, Genève, Svis.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Por bibliografia celo oni sendu periodaĵon en kiu aperas represo el ESPERANTO, al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj, anoncetoj sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj
(kun membreco kaj jarlibro
12s. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 pago £5 : ¼ pago 50 ŝil.
¼ pago 25 ŝil. : ¼ pago 12.5 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :
2 pencoj por unu vorto aŭ
1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj

Legantoj en 74 landoj

IDEALISMO KAJ PRAKTIKO

Ĉu la Esperanto-movado nuntempe perdis sian idealismon? Ĉu la esperantistoj fariĝis teknikistoj kaj komercistoj, kiuj pensas nur pri la racio? Ĉu la belaj oratorajoj dum antaŭaj Universalaj Kongresoj jam definitive ĉesis, por esti anstataŭataj de sobra resumo pri atingitaj rezultoj pri kursaranĝado kaj subteno de oficialaj instancoj? Laŭ la raporto de kelkaj Esperanto-gazetoj pri la lastjara kongreso en Bournemouth oni povas ekhavi tiun impreson.

Karaj pioniroj, mi asertas al vi, ke la laboro de la esperantistoj ankaŭ nun estas bazita sur la sama idealismo, kiu kuraĝigis vin. Ankaŭ nun la esperantistoj—la komitatanoj de U.E.A., la estraranoj de la Landaj Asocio kaj de la lokaj Esperanto-grupoj, kiel ankaŭ la gvidantoj de la studrondoj, do la esperantistoj ĝenerale—dediĉas al nia movado entuziasme kaj malavare sian tempon, sian intereson, sian kapablon, por servi la grandan ideon, kia estas Esperanto.

Kaj tamen estas diferenco! La nuna generacio kreskis kaj maturiĝis sub la influo de la pioniroj, el kiuj multaj en brila maniero esprimis la en Esperanto troviĝantan idealismon. Ni antaŭ ĉio sentas kiel nian devon en la praktiko vivi la idealojn. Kaj tiujn idealojn ni volas vivi per ĉiutaga penado por nia afero en konkordo kaj harmonia laboro. Feliĉe nun jam estas historia pasintaĵo la komercaj kaŝtraktadoj kaj la disputoj pri persona reputacio, pri kio rakontas la leteroj de D-ro Zamenhof. Kaj jam estas historia pasintaĵo la diskutoj, eĉ kvereloj, pri la organiza sistemo de nia movado.

La esperantistoj nun povas kiel veraj idealistoj direkti sian penadon al la disvastigo de nia lingvo—sen flankrigardoj al *internaj malamikoj*. Vi, pioniroj, starigis la idealojn al kiuj ni celu. Nia tasko estas ne malpli grava: zorgi pri tio ke la idealoj ne restu revo, sed fariĝu atingita fakto. Kaj ĝuste tial la informoj pri la sukcesa—kaj certe ankaŭ peniga—laboro de la pacaj batalantoj en la diversaj partoj de la tergloba, kiuj informoj kompreneble estu prezentataj en lingve kaj stile alloga maniero, estas poezio kaj anima nutraĵo kaj flama instigo al la juna generacio.

Kaj nun mi esperas, ke la esperantistoj antaŭ la kongreso en Paris havigos al la Estraro de U.E.A. la eblecon prezenti same grandiozan materialon pri sukcesoj, kiel tiun en la pasinta jaro, kiu estas presita en la Estrara raporto de U.E.A. en la 2-a volumo de la jarlibro 1949.

Dankante al ĉiuj bonaj kaj fidelaj laborantoj por ilia faro dum 1949, mi deziras al ili entuziasmon, kuraĝon kaj sukceson en ilia laboro dum la nova jaro!

E. Malmgren,

Prezidanto de U.E.A.

NOVJARAJ PRIPENSOJ 1950

Inter 1900 kaj 1950 preterpasis grandaj okazintaĵoj sociaj, politikaj, teknikaj k.s. Tio estis duonjarcento de seninterrompa revolucio en pensado, en prijuĝo de ŝajne firme enradikiĝintaj veroj ĉiuspecaj. Konsiderante nur la gigantan progreson teknan, la eltrovojn kemiajn kaj fizikajn, oni povus rajte dedukti, ke la homaro iras rekten al la efektivigo de la tera Edeno. Tio ja ne okazas, ĉar apud ĉiu bonaĵo instaligas ĝia kontraŭo. Tiom multaj inventaĵoj por la bono de la homaro neniel helpis al la realigo de ĉies deziro: la universala paco. En la fino de sia grandioza verko *La tragedio de l' homo*, la poeto Madách paroligas la Disinjoron per la vortoj: *mi diris, penu hom' kaj firme fidu!* Eternaj vortoj, kiuj karakterizas ĉian agadon por realigi la bonon.

Pasis duonjarcento de kiam komenciĝis la publika agado por nia lingvo. Ĝin inaŭguris la ĝeneva filozofo Ernest Naville, prezentante sian raporton *La Langue Universelle* al la Franca Akademio de Sciencoj, sekvatan en la posta jaro de dua raporto verkita de Generalo Sebert kaj Charles Méray pri *Esperanto*. La nuna jaro estas ankaŭ la jubileo de la unua Nacia Societo Esperantista, tiu de la Societo Franca por la Propagando de Esperanto. En Francujo ekiris nia publika agado, kaj ĝin devis kroni la deka kongreso de Esperanto en Parizo 1914. De tiam la historio estas konata. Se de 1900 ĝis 1914 ni vivis en relativa trankvileco oni prave povas diri, ke la maltrankvileco estis daŭra de 1914 ĝis 1950.

Tiu ĉi duonjarcento, kiu transformis multon, estas epoko de la penado enkonduki la internacian lingvon, do Esperanton. Ankaŭ tio ĉi estas ideo revolucia, rompanta la rigidon de la tradicia pensado. Kiom da kontraŭstaro ĉiadevena, komenciĝanta ĉe la Babela Turo, la mita konfuzigo de la lingvoj por malpermesi, ke estu **unu** lingvo sur la tero! Kiom da penoj por forigi la ideon pri **universala** lingvo anstataŭanta la naciajn idiomojn, kaj por komprenigi al la mondo, ke nia celo estas **helpa** lingvo, la **dua** apud la propra! Por venki la opozicion de lingvistoj, kiuj penis pruvi per plej pezaj argumentoj ke tia lingvo neniam solvos la problemon, kiel ja pruvis la fiasko de Volapük! Tamen nenio malhelpis: Esperanto akiris sian lokon, ĝi ekzistas, vivas, posedas ĉiujn karakterizojn de lingvo krom regno kie ĝi povus plenumi la rolon de lingvo popola. Tion lastan ni ne celas. **En tiu ĉi realisma konsidero troviĝas nia forto.**

La jaro 1950 anonciĝis, kiel ĉiuj aliaj novjaraj. Oni formetis la malnovan jaron sen danko, aplaŭde

akceptas la novan. Tiu ĉi optimismo, renovigata ĉiujare, estas la kuracilo kontraŭ la malbonaj spertoj travivitaj. Ni esperantistoj, infanoj de tiu ĉi unua parto de la 20-a jarcento, ankaŭ estas tiaj nevenkeblaj optimistoj. Malgraŭ la multaj malbonaj spertoj, la seniluziigoj, kiuj jam ombris nian vojon, ili ne povis erarigi nin en nia firma konvinko pri la bono de nia klopodado. Okazos nunjare la Universala Kongreso en Parizo, urbo de ideo progreso. Parizo nin vokas, kaj ni anoncu nian venon kun la sama espero, kiel ni tion faris en 1914. Ni penu kaj fidu!

Tre multe homar' kun espero en koro

Pri vivo estonta parolas,

Kaj ĉiam al celo feliĉa kaj ora

Aliri plej baldaŭ ĝi volas.

Jen mondo ekvelkas, jen ree disfloras—

Sed homo esperon senĉese adoras.

H.J.

T.J.O.

Internacia Junular-kunveno de T.J.O. okazos en Konstanz apud Boden-lago dum Julio-Aŭgusto 1950. La ĉefa temo estos *Esperanto kaj Junularo* kun oratora konkurso. Informojn petu de la L.K.K. de I.J.K. Grüngang 9, Konstanz a.B., Germanujo.

Sankta jaro kaj Esperanto

La jaro 1950 estas Sankta Jaro kaj kolektiĝos en Romo centmiloj da katolikoj. Inter 11-17 de Aŭgusto okazos en Romo la 22-a Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj. Informojn petu de la Kongresa Komitato, Via Merulana 124 b, ROMA, Italujo.

Alvoko

En la printempo 1950 la Landa Fremdultrafika Fako en Graz, Aŭstrujo okazigos ekspozicion, kiu estos unu el la plej gravaj en la lando. La lokaj samideanoj intencas ekspluati tion per varbkampanjo kaj uzos Esperanto-standon dum la ekspozicio. Ili petas tujan alsendon de materialo ĉiuspeca. Sendu al: Esperanto-sekcio, Landa Fremdultrafika Oficejo, Herrengasse 16, Landhaus, Hoftrakt., Graz, Aŭstrujo. Dankon.

La internacia foiro de Budapeŝt okazis en septembro, sed ne venis esprimoj de intereso en Esperanto. Nepre petu informon pri la 1950-a kaj petu prospektojn, afiŝojn k.s. La Foiro dum jardekoj uzis Esperanton. Konvinku la estrojn, ke valoras! *Internacia Foiro, Budapeŝt*, sufiĉos.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

Aŭstrujo

Laŭ informoj ricevitaĵ la vienaj esperantistoj vige laboras. Aŭstria Esperanta Servo eldonis aron da propagandiloj k.s. La eldonejo *Tramondo* eldonis novan 300-paĝan vortaron German-Esperantan.

La revuo de la Naturamikoj (*Mitteilungen*) tre vaste legata organo, enhavas regulan Esperanto-rubrikon.

La Esperantista Poŝt- kaj Telegraf-oficista Unuiĝo dum aŭtuno aranĝis plurajn kursojn, kiuj okazas en la domo de la ĝenerala direkto de Poŝto kaj Telegrafo, Wien, Postgasse 8. La kursojn organizas Joh. Janecka, prezidanto de la ciitita unuiĝo.

La Aŭstria Esperanto-Kongreso okazos dum Pentekosto 1950 en Vieno.

Britujo

En la kadro de la Foreign Office Language Society (Lingva Societo de la Ministerio por Eksterlandaj Aferoj) Londono, okazas kursoj de Esperanto kaj ĉiusemajna prelego en Esperanto. La Esperanta Grupo renkontiĝas ĉiŝaŭde en la *Treasury*, Whitehall.

Germanujo

La Ponto, organo de la Germana Esperanto-Asocio, en sia decembra numero enhavas multajn tre interesajn informojn, inter kiuj, la Germana Fervojo pere de sia ĉefadministranto en Offenbach a.M. en letero al diversaj direktoj atentigas pri Esperanto, pri la ekzisto de Fervojista Esperantista organizaĵo, kaj rekomendas ĉiujn praktikajn celojn de la lingvo. Ĝi invitas al kolekto de nomoj kaj adresoj de germanaj fervojistoj, kiuj scias Esperanton. Signifa frazo estas: "La reprezentantoj de la personaro kunlaboris je tiu ĉi decido."

La fervoja direkto en Trier-Trèves invitas al Esperanta kurso elementa la personaron jam konantan fremdajn lingvojn.

La direkto de la Germana Poŝto, centra administracio okcidenta en Frankfurt a.M., rekomendas la lernadon de Esperanto al la poŝtistoj kaj opinias, ke la lernejoj unuavice devas instrui la fundamenton de la lingvo.

La Germana Esperanto-Asocio invitas al la 3-a postmilita Esperanto-kongreso en Mainz, 27.V.-2.VI.1950. Pri informoj oni sin turnu al la Esperanto-grupo, Hoppstrasse 9, (22b) MAINZ.

Hispanujo

Post Saragoso, Valencio, Taraso, Manreso kaj Sevilo ankaŭ en Barcelono nun revigliĝas nia movado. Tial, ke timoj pri publika propagando

kaj libera reorganizado de sendependaj grupoj ankoraŭ ekzistas, oni komencis instruadon de la lingvo en Kooperativo, kiel privata interna agado de la membroj, kaj kelkaj katalunaj pioniroj daŭre kunvenas en kafejo ĉiumonate. Pri detaloj respondas la Delegito de U.E.A. en Barcelono.

Nederlando

En Hengelo la direktoro de la Ŝtata Lernejo por Geinstruistoj, kiu antaŭe interkonsiliĝis kun siaj instruistoj kaj kun la gepatroj de la gelernantoj, decidis, ke Esperanto estu enkondukata kiel deviga fako en lia lernejo por la unua klaso.

La Nederlanda Ministro por Instruado jam deklaris, ke li aprobas la enkondukon de Esperanto tuj kiam sufiĉe da instruistoj estos disponeblaj. Jen grava paŝo por atingi nian celon. Esperanto en ĉiuj lernejoj!

Usono

La Departemento Pri Publika Informado (de U.N.) petis E.A.N.A. sendi al ĝi ekzemplerojn de la Esperanto-traduko de la Universala Deklaracio de Hom-Rajtoj por tutmonda disvastigo. E.A.N.A. jam sendis tiujn ekzemplerojn. **Tio sendube estas la unua oficiala disdono de Esperanto-dokumento flanke de U.N.**

Urugvajo

S-ro Manuel Fernández Menéndez en Montevideo persiste laboras por nia afero. Tion pravas propaganda artikolo 42-paĝa pri *Valor Educativo de l'Esperanto* en la oficiala lerneja revuo *Anales de instruccion Primaria*. La artikolo traktas la tutan demandon de internacia lingvo kaj montras la jam plenumitan laboron kaj la avantaĝojn de ĝenerala adopto de Esperanto. Pluraj ilustraĵoj kompletigas la tezon. Gratulon al la verkinto pro la bona prezento.

S.O.S. por hungara radio!

Meze de oktobro la hungara radio ĉesigis siajn elsendojn en Esperanto. La kaŭzo—manko de subteno! La horo ja estis malfrua, efektive ĉirkaŭ noktomezo, sed oni petas, ke eksterlandaj samideanoj amase skribu al la stacio por peti rekomendon de la dissendoj je horo, kiu estas realisma, nome en kiu la granda parto de la samideanoj povas aŭskulti. Skribu al: Radio Kossuth, Bródy Sandor u. 7, Budapest VIII, Hungarujo.

Germana kongreso 1950

Por helpi al eksterlandaj samideanoj partopreni en la kongreso en Mainz (27.V.-2.VI) Germana Esperanto-Asocio volonte peros reciprokajn aranĝojn pri gastigado. Skribu kiel eble plej baldaŭ al G.E.A., Engelbertstr. 7, MÜNCHEN-Pasing (13b), Germanujo.

VOJAGO DE PROF. D-ro LAPENNA

Unuaj rezultoj

Prof. D-ro Ivo Lapenna, Estrarano kaj speciala komisiito de U.E.A. pri kulturaj rilatoj, kiu nun troviĝas en suda Francujo, sendis al ni la jenan mallongan raporton pri la rezultoj de sia ĝisnuna vojaĝo.

Estas vere malfacile koncize kolekti en kelkminuta raporto ĉiujn impresojn, ĉiujn emociojn kaj ĉiujn konkretajn rezultojn, travivitajn kaj atingitajn dum la unuaj 40 tagoj de la granda propaganda vojaĝo, kiun mi faras nun en la nomo de nia Universala Esperanto-Asocio. La komenco okazis en Francujo, en Parizo, en la lando kaj urbego de nia 35-a U.K. de Esperanto. La 12-an de Oktobro, dum la tradicia komuna vespermanĝo de la Pariza grupo, mi klarigis la ĉefajn celojn de la vojaĝo: (1) prezenti la problemon de Internacia Lingvo al larĝaj popoltavoloj kaj al diversaj sciencaj, artistaj, edukaj rondoj, (2) helpi la grupojn vivi la movadon en iliaj respektivaj lokoj, (3) reaktivigi la iom laciĝintajn malnovajn pionirojn kaj entuziasmigi la novajn adeptojn, (4) esplori sur la tereno la diversajn malfacilaĵojn kaj problemojn de la poresperanta agado kaj tiamaniere ebligi al la Estraro konatiĝi pli senpere kaj pli bone kun la fakta stato de nia movado.

Kioma sukceso estas fakte atingita en ĉiuj ĉi punktoj, montros la estonteco, sed mi persone opinias, ke grandparte la ĝis nun atingitaj rezultoj estas kontentigaj.

Du tagojn poste komenciĝis la vera laboro. La unua granda publika prelego pri la Internacia Lingvo kaj ĝia rolo okazis en plenplena salono de la pariza Sorbono la 14-an de Oktobro. Sekvis paroladoj en la pariza regiono, en la Norda Francujo, en Nordorienta kaj orienta partoj de la lando kaj nun mi troviĝas en la sudo de Francujo. Entute mi faris ĝis nun 44 prelegojn, kiujn ĉeestis pli ol 5000 personoj. Krome, la Radio-stacioj Paris kaj Nancy disaŭdigis 6 diversajn prelegetojn kaj intervjuojn.

La temoj de la prelegoj estis diversaj, sed ili ĉiam turniĝis ĉirkaŭ la Internacia Lingvo. Kelkfoje mi parolis pri la hodiaŭa stato de Esperanto en la mondo. Aliajn fojon mi pli multe prezentis la historion de la Internacia Lingvo por reliefigi pli bone la grandecon de Esperanto. Dum la vojaĝo mem mi venis al ideo, ke kelkfoje estus bone organizi diskut-vesperon anstataŭ fari nur prelegon. Tiu ĉi formo montriĝis tre taŭga precipe se la publiko konsistis el instruistoj, profesoroj, membroj de akademioj k.t.p. En tiaj okazoj mi kutime nur dum kvaronhoro starigas la problemon kaj poste la ĉeestantoj diras siajn opiniojn, faras demandojn, respondas al miaj demandoj k.t.p. La unua tiaspeca diskut-vespero okazis en Arras en la

Norda Regiono. Ĝi estis dediĉita al la mezlernejaj instruistoj kaj al membroj de la Akademio. Estas akcentinde, ke la diskuton partoprenis, inter la aliaj, ankaŭ la prezidanto de la Akademio, S-ro Savagnier. La afero tiom interesis la ĉeestantojn, ke ĉiuj restis preskaŭ ĝis noktomezo.

En kelkaj lokoj mi faris nur prelegon pri Jugoslavujo, la lando de pitoreskaj urboj, mirindaj naturbelaĵoj kaj antikva kulturo. Tiu ĉi prelego estas akompanata de sesdeko da lumbildoj. Kvankam la fakto mem, ke ĝi estas farata en Esperanto prezentas bonan propagandon, tamen mi ĉiam enkonduke ne forgesas akcenti la gravecon de la Internacia Lingvo por la pli bona ekkono de la aliaj popoloj kaj, sekve, por pli efika internacia kompreniĝo.

La prelegoj estis aŭ por la larĝa publiko, aŭ por la lernantoj de diversaj lernejoj, aŭ por la membroj de diversaj klerigaj societoj. Estas malfacile diri kie la efiko estis plej bona. Mi persone opinias, ke la plej bona rezulto estas atingita en tiuj lokoj, en kiuj oni sukcesis organizi kaj publikan prelegon kaj apartajn prelegetojn en la lernejoj.

Post la prelegoj la pli spertaj lokaj grupoj tuj malfermis novajn porkomencantajn kursojn. Mi ne povas precize diri kiom da personoj aliĝis al la kursoj, sed juĝante laŭ la ĝenerala favora akcepto de la ideoj esprimitaj en la prelegoj, mi deziras esperi, ke ilia nombro estas konsiderinda.

En kelkaj lokoj, ekzemple en Lyon aŭ en Nancy, la kursoj jam estis komenciĝintaj, kiam mi alvenis. La lernantoj partoprenis la diversajn kunvenojn kaj aliajn aranĝojn. Tiel ili havis okazon mem konstati la facilan kompreneblon de la lingvo. Se estis iel eble, mi vizitis la porkomencantajn kursojn en ĉiuj lokoj, kie ili okazas. Al la lernantoj mi faris almenaŭ mallongan, treege simplan paroladeton en Esperanto. Granda estis ilia ĝojo pro la fakto, ke, jen, post du aŭ tri lecionoj ili povas kompreni fremdulon.

En multaj lokoj estis farita tre utila laboro ekster la prelegoj. Ekzemple en Arras, St. Pol, Chantilly, Reims, Epernay, Villefranche, St. Donat mi havis okazon persone kontaktiĝi kun la respektivaj urbestroj kaj interesigi ilin pri nia afero. En la universitataj urboj, ekz. en Parizo, Nancy kaj Lyon, mi vizitis la jurajn fakultatojn, persone konatiĝis kun multaj profesoroj kaj sukcesis prezenti al ili la gravecon de la Internacia Lingvo. En aliaj urboj la lokaj geesperantistoj kontaktigis min kun prezidantoj de komercaj ĉambroj, lernejoj, inspektoroj kaj direktoroj, funkciuloj de turismaj oficejoj k.t.p. Bona laboro en tiu senco estis farita precipe en Reims, Nancy, Villefranche kaj Chantilly.

La prelegoj kutime estis anoncigitaj en la lokaj gazetoj, per afiŝoj kaj per apartaj invitiloj. Ofte la lokaj gazetoj favore raportis pri la aranĝoj. Ĝis nun aperis entute ĉ. 70 diversaj anoncoj, artikoloj kaj artikoletoj, rilatantaj al la rondvojaĝo. Se oni konsideras, ke kelkaj el tiuj gazetoj estas eldonataj en pluraj dekmiloj de ekzempleroj, oni povas trankvile diri, ke minimume 100,000 personoj en Francujo ĝis nun aŭdis ion pri nia lingvo en kunligiteco kun la vojaĝo.

Estus mia devo menciigi ĉi tie la nomojn de la grupaj kaj federaciaj funkciuloj, kiuj organizis la vojaĝon en siaj lokoj kaj regionoj. La listo de tiuj agemaj kaj oferemaj geamikoj estus tro granda, se mi volus ĉiun el ili nomi aparte. Minimume sesdek geesperantistoj en diversaj partoj de Francujo tre aktive kunlaboris kaj kunlaboras por la plena sukcesigo de la vojaĝo. En la nomo de U.E.A. kaj en mia propra nomo mi esprimas al ili ĉiuj mian plej profundan dankon. Mi estas profunde konvinkita, ke la komuna laboro, kiun ni faras por nia komuna idealo donos pli aŭ malpli frue pozitivajn rezultojn.

(*Nota de la redakcio* : D-ro Prof. Lapenna daŭrigos sian vojaĝon en Francujo, kie li restos ankoraŭ plurajn monatojn.)

La 35-a Universala Kongreso de Esperanto Parizo 6-13 Aŭg. 1950

Kongresejo : La Kongresejo jam estas definitive fiksita, en la Sorbonne, sidejo de la Pariza Universitato. La Malferma kaj Ferma Kunsidoj de la Kongreso okazos en la granda amfiteatro, majstre dekoraciita de la pentristo Puvis de Chavannes, kaj kiu povas enteni 2700 personojn. En Sorbonne okazos ankaŭ la Interkoniĝa Vespero.

Balo : La tradicia Balo kun naciaj kostumoj malvolvos siajn figurojn en la admirindaj salonoj de Hôtel Continental, la plej luksaj en Parizo, kiu povas enteni 3000 dancantojn.

Poŝtejo : La Ministro de la Francaj Poŝtoj konsentis pri instalo en Sorbonne dum la daŭro de la Kongreso, de Poŝtejo en kiu la korespondaĵoj estos stampataj per speciala stampilo. La Ministro konsentis pristudi la eldonon de poŝtmarko kun Esperanta teksto. La realigo de tiu grava projekto dependos de decido de la Ministra Konsilantaro.

Transportoj : La administracio de la francaj fervojoj konsentis doni al la kongresanoj la jenajn avantaĝojn :

- (a) rabaton de 20% por tiuj, kiuj vojaĝos individue,
- (b) rabaton de 30% por tiuj, kiuj vojaĝos kolektive.

Tiuj rabatoj validos nur de la franca landlimo enlanden.

Loĝado : La kongresanoj, kiuj deziras tion, povos loĝi en la liceoj de Parizo. La dormejoj estos — aŭ ne, laŭ la liceoj — apartigitaj en "ĉambrojn" per kurtenoj aŭ lignaj vandoj.

Por kongresanoj, kiuj deziras loĝi sub tendo, la Kongreso disponigos la belan dekhektaran parkon de la liceo Michelet, je sep minuta piediro de la Metrostacio *Porte de Versailles*, kaj je dudek minutoj de la Sorbonne.

Pri la hoteloj—kiuj cetere estos superŝutitaj de turistoj—nia agentejo Cook garantios ĉambron al niaj samideanoj laŭ la ĝusta prezo aprobita de la Pariza Prefektejo. Se en iu okazo ne restos ĉambro je la prezo petita de la kongresano, la agentejo devos proponi ĉambron de kategorio analoga, nur iom superan.

Internacia Somera Universitato : Serio de ok prelegoj estos farata en Sorbonne de kelkaj famaj profesoroj, kiuj praktikas Esperanton. Al tiuj prelegoj estos invitataj neesperantistaj kleruloj por ke ili povu persone konstati la tujan komprenon de nia lingvo flanke de diversnacia publiko.

Ekskursoj : Estas organizotaj multaj ekskursoj, kiuj permesos al samideanoj vidi la ĉefajn monumentojn de la urbo kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. Ili povos trankvile partopreni promenadon laŭ *Champs Elysées* kaj la parizan vivon en ĝia movoplena cirkulado kontraŭ la *Arc de Triomphe*, kiu reĝe superregas la plej belan kvartalon de la ĉefurbo. Ili povos viziti la katedralon *Notre-Dame* kiel ankaŭ *Sainte-Chapelle* kiuj jam de 700 jaroj elvokas la admiron de ĉiuj, kiuj komprenas la profundan sencon kaj la senegalan belon de tiuj ĉefverkoj de skulptarto.

Ili povos viziti la *Invalides* kun la impresa tombo de Napoleono, kaj la *Panthéon*, kiu starigas fiere sian kupolon super la grandega urbo, kaj la *Tour Eiffel* jam de 40 jaroj borantan la ĉielon.

Ili povos promeni en boato sur *Seine* por ĝui ravan spektaklon de la bordoj de la riverego, kaj ili povos viziti ankaŭ la fame konatajn kabaredojn de *Montmartre*.

Postkongresaj ekskursoj : Aliaj ekskursoj kondukos, laŭ niaj nunaj projektoj, niajn samideanojn al la plej belaj regionoj de Francujo : al *Mont St.-Michel* kaj *Deauville* ; al *Strasbourg* kaj la *Vosges* ; al *Marseilles* kaj la Mediteranea Maro (kun promenado sur maro), al *Nice*, *Annecy*, *Chamonix*. Oni konstatas, ke la vojaĝo al Parizo estos plej agrabla kaj riĉa je valoraj memoraĵoj ; sed oni tuj aliĝu al la Kongreso, se oni ne volas maltrafi la profiton de malkara aliĝprezo.

ENIGMA KONKURSO N-ro 44

Solvejti oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 20-A Avenue Molière, Brussel-Forest, Belĝujo.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 40-a konkurso : S-ro A. H. v. d. Broek (Ned.) 101 p., S-ro F. Taylor (Brit.) 101 p., S-ro P. Saretto (Franc.) 97 p.


Solvejti de la enigmoj en Konkurso N-ro 42 :

N-ro 87 : unuigo, alfluo, erpilo, angoro, vualon, faruno, korneo, kroato, oktavo, urtiko, sturno, solvon, kverka, alkofo, silabo, onikso, oftege, afabla, blufon.

N-ro 88 : Jozefo kaj Tomaso diference eldiras pri Vilĉo, ili do havas diferencajn ĉemizojn kaj Filipino mensogas pri ili. Filipino do havas bluan aŭ brunan. El tio sekvas, ke V. ne taŭgas, do Vilĉo havas verdan ĉemizon. Laŭ I, 2 do Jozefo havas flavan kaj Filipino havas bluan ĉemizojn, kaj Georgo ne havas flavan pro kio laŭ IV, 2, 4 Georgo nur povas havi verdan aŭ brunan. Ĉar Jozefo havas flavan, laŭ III, 3 Tomaso havas bluan kaj Georgo ne havas verdan, do Georgo havas brunan.

N-ro 89 : Dimanĉo ĝis vendredo = 7 x dimanĉo, do lundo ĝis vendredo = 6 x dimanĉo ; sed lundo ĝis sabato ankaŭ = 6 x dimanĉo, do sabate ne pluvis.

Enigmo N-ro 93 : Sesangula enigmo : Ĉiu el la ses fakoj ĉirkaŭ numerita sesanguleto devas enhavi unu literon. Tiuj ses literoj formas vorton. Ĉe la klarigo de ĉiu vorto troviĝas interkrampe du literoj. La unua indikas (laŭ la flanko presita sesangula steleto) la fakon, en kiu komenciĝas la koncerna vorto ; la dua indikas la lokon de la dua litero de tiu vorto. La signifoj de la 19 vortoj estas :—1. parto de vesto (ED) ; 2. bukla (BC) ; 3. disigo pro malsameco de opinioj (EF) ; 4. monato (DE) ; 5. kurba fera peco (EF) ; 6. ĝardeno paviloneto (EF) ; 7. dolĉemola brila speco de silkajo (FE) ; 8. granda raba mamulo (BC) ; 9. metala pikilo (AB) ; 10. metala armaĵo ŝirmanta la bruston (BC) ; 11. tranĉigi (CB) ; 12. atentigi iun pri io (FE) ; 13. komenca stadiono (DE) ; 14. estas absolute necesa (BA) ; 15. tuj mortonta (AF) ; 16. pororiĉa (DE) ; 17. malice erariganta (EF) ; 18. glueca knedeblo tero (AB) ; 19. maniero laŭ kiu iu pensas (CD).



Enigmo N-ro 94 : Sesangula enigmo (uzu la saman desegnon kiel por N-ro 93) : 1. libro kies paperfolioj estas okoble falditaj (FE) ; 2. maldika etenditaĵo de iu substanco sur io alia (AB) ; 3. longa versa rakonto pri herooj (FE) ; 4. kvanto donata al ĉiu (BC) ; 5. subtera ĉambro en preĝejo (BA) ; 6. homo tre forta (FA) ; 7. elsputi (ED) ; 8. moka dirmaniero (CB) ; 9. societo por komuna celo (EF) ; 10. tien multaj el vi deziras iri (BC) ;

11. plibeligi (BA) ; 12. mustolo kun multvalora blanka peito (EF) ; 13. angla grenbrando (AB) ; 14. banurba publika amuzejo (AB) ; 15. afable peti, ke iu venu (BC) ; 16. malvarma (AF) ; 17. pruvo, ke akuzito estis aliloke ol ĉe la loko de la krimo (DE) ; 18. palpa organo de insekto (AB) ; 19. forigi la finvokalon de vorto (AF).

Enigmo N-ro 95 : Perditaj proverboj : Reordigu la ĉi-subajn litergrupojn tiel, ke vi trovos proverbojn el la Zamenhofa proverbaro.

1. ald-erv-ine-nis-njo-peo-po-roj-sam-tem-usi-vas.
2. aĝu-alm-als-ehe-lon-lpa-mon-no-onu-rba-sad-sto.
3. afa-aku-ast-bon-bon-est-ide-int-mal-mos-rap-ras-ren-ude.
4. aha-asl-dez-edo-jar-kiĝ-lan-ojb-ojn-org-roj.
5. ado-apr-ĉas-ĉas-eĉk-ino-pla-sel-tos-ufi.

INTERNACIA KONKURSO 1949 Stato je la 30-a de Novembro

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Jugoslavujo	1600	3245	202.8
2. Islando	500	650	130.0
3. Svedujo	4100	5094	124.2
4. Portugalujo	700	815	116.4
5. Belĝujo	1700	1956	115.1
6. Germanujo	1600	1760	110.0
Argentino	900	990	110.0
7. Norvegujo	1300	1414	108.7
8. Brazilo	2000	2166	107.8
9. Urugvajo	250	255	102.0
Usono	3000	3061	102.0
10. Britujo	13000	13116	100.9
11. Aŭstralio	950	945	99.5
12. Danujo	3200	3060	95.6
13. Nederlando	5400	5042	93.4
14. Nov-Zelando	900	839	93.2
15. Svislando	1400	1265	90.4
16. Polujo	4000	3595	90.0
17. Italujo	1600	1425	89.0
18. Finnlando	2000	1675	83.8
19. Francujo	6200	5165	83.3
20. Sud-Afriko	250	210	82.0
21. Kanado	300	230	76.6
22. Egiptujo	300	225	75.0
23. Hungarujo	1800	1320	73.3
24. Irlando	300	190	63.3
25. Izraelo	400	240	60.0
26. Aŭstrujo	1000	575	57.5
27. Hispanujo	1200	530	44.2
28. Bulgarujo	1600	310	19.4
29. Ĉeĥoslovakujo	5300	545	10.3

Jugoslavujo ankoraŭ tenas sian pozicion ĉe la supro de la tabelo, kaj se ne okazos lastminuta salto de alia lando ĝi certe venkos. La rezulto de la konkurso aperos en nia venonta numero.

Ankaŭ en tiu numero ni anoncos detalojn kaj kvotojn por simila konkurso en 1950. Jam nun komencu labori por ke via propra lando atingu en la nuna jaro minimume 100%.

Kongreso S.E.A.T.

Okazis 15-17 de Julio en Strasburgo la unua kongreso de la Sindikata Esperantista Asocio Tutmonda. Kiuj deziras informojn pri la celoj de S.E.A.T. skribu (aldonante respondkuponon) al : (por Eŭropo) J. Coen, 9 rue Arthur Roland, Brussel III, Belĝujo. (Por aliaj) Ferdinand, 20 rue du Béquet, Bègles, (Gir.) Francujo.

ESPERANTO KAJ RADIO

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Ĉiutage	14.45-15.00	Praha. 1935m. kaj 31.41m. I. Ĉeĥoslovaka Radio, Esp.-sekcio, Stalinova 12, Praha XII.
	17.15-17.30	Paris. 48.82m. Radio-diffusion Francaise, 118 Champs-Élysées, Paris 8.
	18.45-19.00	Sofia. 39.11m. P. Radio Sofia.
	21.00-21.15	Praha. 49.92m. P.
Lundo	05.30-05.35	Wien. 506m., 31m., 41m. I.
	07.15-07.30	Sveda Radio. 49.46m., 27.83m. P. Sveriges Radio, Stockholm 7.
	15.15-15.30	Sveda Radio. 19.80m., 27.83m.
	16.30-17.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. Rádio Ministério da Educação e Saúde, Rio de Janeiro, (DF), Brazilo.
	21.45-22.00	Praha 470m., 325m., 259m.
Mardo	01.15-01.30	Sveda Radio. 49.46m., 27.83m.
	08.05-08.20	Paris. 386.8m. K. (Ĉiun duan mardon de 18.X).
	11.55-12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 28, Bern.
	14.15-14.30	München. 405m. kaj 48.70m. kaj Nürnberg 315.8m. K. (ĉiun duan mardon). Radio München, Kulturabteilung, Rundfunkplatz 1, München, Bayern, Germanujo.
	17.35-17.40	Bern. Kiel je 11.55, sed anst. 16.87m. sur 19.60m. (Krom la unua mardo).
Merkredo	19.15-19.30	Warszawa III. 48.23m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszydowa 8.
	21.45-22.00	Praha kiel lunde.
	22.00-22.45	Praha II. 269m., 325m., 219m. Verda Stacio nur la unuan merkredon. Stalinova 12, Praha XII, ĈSR.
Ĵaŭdo	11.55-12.00	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	17.35-17.40	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	22.00-22.10	Ostrava. 259m.
Vendredo	15.40-15.55	Wien. 228m., 25m., 31m., 41m. I. Ĉiun duan vendredon. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV.

Klarigo—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Anglo verkas por la Verda Stacio

En la fruaj monatoj de la nova jaro la Verda Stacio en ĈSR intencas dissendi novan opereton verkitan tiucele de S-ro Frank Buckley, reĝisoro de la Teatra Trupo de Bristol, kaj lektoro kaj verkisto pri la dramo. La nova opereto havos la titolon *La Blua Bovino*. S-ro Buckley reĝisoris la prezentadon de *Sonĝo de Somermeza Nokto* (Shakespeare) dum la brita kongreso en Bristol, 1946.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝo

Allen al Ges-roj H. C., en King's Lynn, Anglujo la 4-an de decembro filino Ruth Prudence Quinta.

Fianĉiĝo

Rapley-Herbert. S-ro J. C. Rapley kaj F-ino E. M. Herbert en Londono.

Edziĝo

Kollerová-Barák. Irenka Kollerová kaj Stanislav Barák en Trnava, ĈSR anoncas sian geedziĝon 19.XI.1949.
Ravetilat Puig S-ro J., Delegito de U.E.A. en Ventajola-Puigcerda, Hispanujo en novembro al F-ino J. Capdevila Piguellém.

Niaj mortintoj

Ni eksciis kun granda bedaŭro pri la forpaso de la jenaj gesamideanoj. Al iliaj familianoj ni esprimas nian profundan kondolencon.

Bues Karl, en Hannover, Germ., sept. 1949. Kasisto de loka grupo.

Gonzalez Rafael, post longa malsano en Alcira, Hisp. Del. de U.E.A.

Kavan František, en Plzeň ĈSR 25.X.49. Dum jaroj del. kaj Peranto de U.E.A., honora prez. de la loka grupo, sindona administranto 1917-1923 de la gazeto *Progreso*. U.E.A. ŝuldas al li multan dankon pro lia malegoisma kunlaboro okaze de la disfalo de la aŭstra monarkio kaj ekesto de la ĉeĥoslovaka respubliko. Honoron al lia memoro. *H.J.*

Kyffin-Taylor, Brig.-Gen. G., en Birkenhead, Anglujo, 13-an de decembro, 85-jara. Multjara kaj malavara subtenanto de nia movado en Britujo.

Millie George F., en St. Annes, Angl. 31.X.49. Iam Del. en Timperley.

Mothejzik Frant., en Ustí nad Labem, ĈSR, 13.VI.49, 47-jara. Esperantisto de sia 17-a jaro kaj multe laboris por nia afero.

Neutens F-ino M., 19-jara samideanino en Mechelen, Belg. Mortis 9.VIII.49 en Basel, Svislando.

Olausson Per Oskar, 58-jara, en Stockholm, 22.VI.49. Dum multaj jaroj prezidanto de la Klubo Esperantista de Tramistoj.

Suchy Franz Josef (Seka), en Mainz-Gross-Gerau, Germ. 10.X.49, tradukinto de *Diabliĉ' en botel'* de R. L. Stephenson.

Witschi F. A., en Biel, Svisl. 4.XI.49.

Esperanto-servo en ĈSR

La slovaka oficejo por informado kaj klerigo en Bratislava eldonas en kelkaj lingvoj—inkluzive de Esperanto—ĉiumonatan informbultenon *Kultura Revuo*, kiun oni volonte sendas senpage al petantoj. Ĝi informas pri slovaka kulturvivo kaj aktualaĵoj. Skribu al: Poverenictvo informácii a osvety, Bratislava, Ĉeĥoslovakujo.

Membro-adoptado 1950

Estas neeble fari transpagojn el pluraj landoj, inkluzive de Ĉeĥoslovakujo kaj Jugoslavujo. Ni tial invitas samideanojn en pagokapablaj landoj "adopti" Esperantiston per pago de lia (ŝia) kotizo 1950. Tion on povas fari pagante al la ĉefdelegito aŭ peranto al kiu oni kutime pagas. **Montru la solidaron de la Esperantista familio kaj ebligu al niaj samideanoj partopreni en nia afero!** Antaŭdankon.

TRA LA LIBRARO

* = akireblaj ĉe U.E.A.



***Komercaj Leteroj** de C. A. Pruisen. Eld. The Esperanto Publishing Co. Ltd. 18.5 × 12.5 cm., 63 paĝoj, broŝ. 2 ŝil.

Mi konfesu, ke legonte ĉi tiun libron, mi atendis, ke ĝi efikos iel tede; sed mi tuj plezure konstatis, (1) ke ĝi estas verkita en neordinare bonstila Esperanto (2) ke la leteroj estas vere tiaj, kiajn komercisto ofte bezonas verki kaj (3) ke la interplektitaj konsiloj ne nur helpas al akiro de bona komerca stilo en Esperanto, sed egalmezure valoras por atingo de samfaka klareco, nacilingve.

Post ĉiu letero, sub rubriko *Vortoj* oni trovas la bezonajn klarigojn pri la ĵus enkondukitaj fakvortoj. La *Taskoj* por la studanto estas diversaj kaj interesaj. Estus tamen pli utile al la hejmlernanto se, ilin farinte, li povus sin turni al respektivaj *modeloj* por posta komparo.

En la kadro de nur 63 paĝoj oni prezentas al la leganto neatendite grandan kvanton da informo multspeca. La temoj mem pruvus tiun diversecon: *La arto skribi bonajn leterojn*, *Pri uzo de interpunkciaj signoj*, *Vorttrancado* k.t.p. Legante pluajn artikolojn pri *averio*, *asekuro*, *permara komerco* oni cetere ĉerpas instruon ne nur pri novaj Esperantaj vortoj, sed ankaŭ pri la temoj mem.

Mankas spaco por tre detala prikomento. Jen tamen du aŭ tri aferetoj eble pripensindaj por posta eldono:

S-ro Pruisen saĝe konsilas maksimuman koncizecon. Kial do: *Ni jam estas negocadantaj kun kaj la kestoj staris sur la kajo por esti enŝipigitaj?* Ĉu ne plene sufiĉus *Ni jam negocadas kaj staris . . . por enŝipiĝo?* La malsimplajn formojn oni laŭeble evitu.

La aŭtoro klarigas: *Kodoj: Se oni volas telegrafe komuniki gravajn komercajn informojn oni ofte uzas iun sekretan skribon, kiu nur per speciala ŝlosilo povas esti deĉifrata.* Kompreneble en la komerca mondo oni malofte uzas kodon por komuniki sekrete, sed simple por . . . ŝpari kostojn!

Unu ne tre belan frazon mi elpinĉis: *La firmo V jam aĉetis meblojn de ni kaj de diversaj tipoj kaj kvalitoj (aĉetis de ni meblojn de diversaj tipoj . . .).*

Atentinda ankaŭ: *La punkton oni ankaŭ uzas por indiki . . . datojn: 6.5.47.* En Usono tiu ciferserio signifas: *Junio/la 5-an/1947*, sed en aliaj landoj *la 6-an/de Majo/1947*. Ĉar temas pri internacia korespondado oni do prefere litere skribu la nomon de la monato.

Finvorte: plena konsento pri la konsilo de la aŭtoro, *Oni neniam Esperantigu geografiajn nomojn en adreso sur koverto.* Jam de longe mi sentadas, ke ni NE simpatiigas poŝtoficeistojn kaj leterportistojn al nia afero pere de Esperanta ortografio. Mi voĉdonas favore al *Germany/Deutschland/Allemagne* anstataŭ *Germanujo* k.s.

Preso kaj kompostado bonegaj. Ni ne forgesu gratuli ankaŭ la eldonistojn!

N. H. C. Macpherson.

***Ni Kantu kaj Deklamu!** Eld. Libroservo F.L.E., Amsterdam. 15.5 × 11.5 cm. 111 p. karton. prezo 2 $\frac{1}{4}$ ŝil.

Temas pri la 3-a eldono de kantaro multe uzata en la rondoj de la nederlandaj laboristaj Esperantistoj kaj konata ankaŭ en la eksterlando. Enhavo: 91 kantoj (ĉ. 40 klasbatalaj) kaj 16 poemoj. Komparante kun la 2-a eldono oni konstatas, ke la nombro malpliĝis je ĉirkaŭ 20 kantoj; kelkaj estas anstataŭigitaj per pli taŭgaj, aliaj korektitaj. Tamen pliaj korektoj estas dezirindaj. Ofte la stilo de la originalaj tekstoj estas pli flua ol tiu de la tradukoj. Precipe plibonigenda ŝajnas al mi *La proletarioj* (p. 74). En ĝi la vortordo estas ne nur libera, sed eĉ kaosa (*La oron kiu fosas, Martelas en ŝtalej'* kaj *Sklavigas kiun ĉiam Tirana, raba band'*). Mi ne volas tro plendi pri *el l'opero* (p. 17 en superskribo) sed *l'arme'* (p. 29) k.s. sed por *l'homaro* (p. 11) kaj *dankas l'homar'* estas evitindaj. La lasta estas neelparolebla.

Ne mankas preseraroj. La eldonistoj donis la melodion al kelkaj per notnombroj. Se oni farus tion ĉiukaze la kantaro estus pli bone uzebla por internacia kantemularo. La necesan spacon oni povus gajni forigante la deklamaĵojn. Tiuj lastaj ne estas malbonaj, kelkaj eĉ estas bonaj, ekzemple *Al la juda foririnto*, *Ankoraŭ kelkajn jarojn nur*, sed ili estas iomete neorganikaj en la kadro de kantaro.

Mi rekomendas ordigi la indikson alfabete laŭ la kantkomencoj, sed ne laŭ la superskriboj.

Erich Dahlmann.

Esperanto-Schnell-Kurs de Hans Koch. Eld. Oskar Ziegler & K-o, Deisenhofen-München. 14.5 × 10.5 cm. 52 p., karton, prezo 1 g.m.

La **Rapid-Kurso** estas nur malmulte ŝanĝita nova eldono de lernolibro aperinta antaŭ 25 jaroj. En 10 lecionoj ĝi peras koncize la Esperanto-fundamenton al germanlingvanoj. Taŭga por doni superrigardon al kleraj varbotoj, por helpi tiujn, kiuj deziras refreŝigi sian Esperanton aŭ volas kompletigi la gramatikon post rektmetoda kurso. Por komencantoj eble iomete *kruta*. Multaj viglaj tekstoj ekzercas ambaŭdirekte.

Erich Dahlmann.

Al
Salzn
Villet
26 p.
Al
ne es
tradu
boneg
Rab
rako
aŭto
tero
Riĉiĝ
rifuza
Fine
tuta
nia t
estis
Li
gram
stila
prese
en la

S-
Espe
punk
de Z
punk
Si
klari
kelk
Tam
Gran
(rep
Gran
ĝin,
via l
kore
frua
Ekze
sidis
Kres
D.
(84)
por,
en la
1926
Krei
li sin
ŝi po
paĝo
skrib
logik
ekzer
bonf

Al ĉiuj egale de Salom Aleĥem. Trad. M. Salzmann, 37 Av. Henri-Barbusse, Lyon-Villeurbanne (Rhône), Francujo. 15×12cm. 26 p., prezo nemontrita.

Al la literaturamantoj la nomo Salom Aleĥem ne estas nekonata ĉar jam aperis en Esperanto-tradukoj kelkaj el liaj noveloj, inter kiuj estas la bonegaj Zamenhofaj tradukoj *La Gimnazio kaj Rabeno de Baharah*. Al *Ĉiuj Egale* estas simpla rakonto verkita en la bonhumora satira stilo de la aŭtoro. Per la interveno de Dio ĉiu homo sur la tero ricevas egalan parton de la mondriĉaĵo. Riĉiginte, la bakisto rifuzas baki, la buĉisto rifuzas buĉi, kaj la botisto rifuzas fari botojn. Fine oni trovas, ke "ne en la mono tenas sin la tuta feliĉo de la homo." La instruo validas por nia tempo, kiel por la tempo en kiu la rakonto estis verkita.

Lingve la traduko ne estas perfekta. Troviĝas gramatikaj eraroj—eĉ de elementa speco—kaj stilaj malglataĵoj, kaj oni ne forigis ĉiujn prezerarojn. Al mi ŝajnas rekomendinde, ne uzi en la prozo la vorton *repliki* (*respondi*) p. 10.

John S. Dinwoodie.

"Ĉirkaŭ nova libro"

S-ro Padfield sur p. 91 de la julia numero de *Esperanto* stimulas helpeman diskuton pri lingvaj punktoj en mia recenzo (p. 50 aprilo) pri *Leteroj de Zamenhof I*. Mi deziras malkonsenti pri kelkaj punktoj.

Siatempe: En *Lingvaj Respondoj* (59) Zamenhof klarigis sian mallogikan uzon de ĉi tiu vorto kaj kelkaj Esperantistoj ankoraŭ tiel uzas ĝin. Tamen Lippmann (tiam direktoro de la Sekcio de Gramatiko) en sia raporto al la Akademio 1927 (represita en la *Aldono* ĉe la fino de *Kompleta Gramatiko* (Fruictier/Grenkamp) malrekomendas ĝin, kaj citas *Readmono* 11/14 "*Tiam Mi donos al via lando pluvon siatempe*" kie la Londona Biblio korektis al "*ĝiatempe*". Li komparis ĝin kun la frua uzo de *si* ĉe la unua kaj dua personoj. Ekzemple, en 1887 *Unua Libro* 22/25 donas "*Ni sidis, tenante sin koro ĉe koro*" dum *Fundamenta Krestomatio* 1903 korektis al "*nin*".

Danki por: Vere estas, ke en *Lingvaj Respondoj* (84) Zamenhof ŝanĝis ĉe Kabe *danki pro* al *danki por*, sed tio estis nur frua lia kutimo. En 1894 en la *Ekzercaro* (14/6, 31/14) li skibas *por*, sed en 1926 li skibas en *Anderson II* 39/32 *Danku vian Kreinton pro la ĉio bona*. Ankaŭ ĉe la verbo *pagi* li sin korektis: 1894 *Ekzercaro* 21/4 *Mi pagos al ŝi por tio ĉi*. 1926 *Anderson II* 8/19 *Ni certe bone pagos pro tio*. Wüster samopinias en sia *Vortaro* skribante: *unue "pro" kaj nur poste "por"*. Kaj logike estas, ke oni dankas *por* flati, *por* fari ekzemplon al la junuloj, *por* ricevi estontajn bonfarojn, sed *pro* la bonfaro jam ricevita.

G. Rust.

La ĝardeno de la amaŭto

La amaŭtoj de la tempo de la antikva inkao-kulturo estis tre meditemaj homoj. Al la popolo ili montris la vojon al la perfektigo. Maturaĝaj ili retiris sin en izolajn montaran regionon, kie ili rilatis mediteme kun la spirito de la kosmo.

Unu el ili konstruis sian kabanon ĉe la rando de la plej abruptaj deklivoj de la Andoj. Dumnokte li deĉifris la sekretojn de la steloj, nekompren-eblajn por la ceteraj popolanoj. Dumtage li sin okupis pri sia ĝardeno.

Belegaj estis la floroj de tiu ĝardeno kaj ili allogis la homojn proksimajn kaj malproksimajn. Inter ili estis maljuna estro, milita ĉefo de la regiono, akompanata de brila sekvantaro.

"Donu al mi," li diris al la amaŭto, montrante per la fingro mirige belan floron, "la bulbon aŭ la semon de tiu planto."

"Tio ne eblas, Estro."

"Kial do?"

"Tiu floro ne estas generebla per bulbo nek per semgrajno."

"Sed kiel ci kulturas ĝin?"

"Nur per tri sorĉvortoj."

"Kiu ili estas?"

"Toleremo, respekto kaj fidelo."

La maljuna militestro silente retiris sin kaj meditis longe pri la parolo de la amaŭto. Iun tagon li venis sen sekvantaro kaj sen pompo al la kabano de la saĝulo. Li humile diris al la Majstro:

"Kion volas esprimi la vorto toleremo?"

"Ĝi estas la fina esprimo de la saĝo," respondis la filozofo. "Nur tiuj, kiuj kapablas penetri en sin mem, rekonas la proprajn neperfektaĵojn kaj tial povas pardoni tiujn de aliaj."

"Kaj la respekto?"

"Tio estas mistika sento, Estro. La homo entuziasmiĝas antaŭ bela manskribo aŭ pro bela muziko de la fluto. Li montras grandan respekton antaŭ la artaĵoj, kiujn produktas la homa estaĵo. Kial ne rigardi ankaŭ en la animon de la homo por ekkoni la plej belan verkon, kiu ekzistas sur tero, kreitan de la senkompara spirito de la dieco, kaj por kompreni kaj respekti ĝin?"

"Kaj kiel ci difinas la fidelon?"

"Tio estas la sekvo de la unuaj sentoj. Ĉiu, kiu kapablas toleri la proksimulon kaj scias respekti lin, estos fidela kontraŭ la najbaro, la komunumo kaj si mem."

"Kiel nomiĝas tiu belega floro de cia ĝardeno?"

"Tiu estas la floro de amikeco, Estro."

Ĉu ne ĉiu homa agado devas esti bazita sur la toleremo, la respekto kaj la fidelo?

laŭ Inez de Castro.

Trad. el la hispana Juan da Silva.

J. Régulo Pérez :

PENSOJ PRI LIBRO

Mi kutime ferias sur alia insulo ol tiu sur kiu mi profesie laboras dum la lernojaro. Tie troviĝas miaj antaŭmilitaj libroj en Esperanto, el kiuj mi ĉiŝomere relegas kelkajn. Ĉi-jare, koicide kun la 150-a datreveno de la naskiĝo de Aleksandro Sergejeviĉ Puŝkin, relego vicis al ĉi ties ĉefverko *Eŭgeno Onegin* tradukita de N. V. Nekrasov.

Dum la relegado dum mi tie kaj tie trovis paŝosignojn de miaj antaŭaj suiroj tra la paĝoj, jen per substreko sub trafe alloga esprimo, jen per margena klarigo de neofta vorto, ekleviĝis en mia animo la eventoj, kiuj ebligis al mi la ekkonon kaj ĝuon de tiu mond-literatura klasiko. Miaj pensoj iris al Zamenhof, al Esperanto, kaj al diversaj organizaĵoj kaj homoj, kiuj havigis al mi la libron antaŭ proksimume dek kvin jaroj kaj kiuj sur unu paĝo skribis "Al nia Kanaria amiko J.R.P.—Junaj pioniroj, junkomunistoj kaj gelernantoj ĉe la stacio Haĉmas (Kaŭkazio)."

Nu, jen mi ekmeditis pri la fato, la destino de tio, kion oni konas sub la vorto *libro*. Libro estas ia miraklo. Forgesita dum multaj jaroj, je rea malfermo, jen ĝi kantas, parolas, kiel iam antaŭe. Ĉi-okaze estas la voĉo de Puŝkin, aŭskultebla de mi danke al la amo de Nekrasov kaj la zorgo de iamaj kaŭkaziaj gelernantoj, la sama voĉo de antaŭ dek kvin jaroj, la sama de antaŭ cent kvindek, kiun ĉiuj turniĝoj de la fortuna ne povis aliĝi, sed daŭre kaj sensange kantas. Vortoj estas ĉiopovaj, elastaj simboloj. Ŝajnas al mi, ke jen la varmo de la vivo iel enestas, daŭras en libro, kiel ja la varmo de la suno vivas en kverko.

Mi memoris la artikolon *Kunlaboradantoj* de amiko I. Gomes Braga aperintan sur la paĝoj de ĉi tiu sama gazeto, kie verve kaj impese la aŭtoro montris kiel per siaj verkoj la tiel nomitaj mortintoj daŭre kunlaboradas por la subteno kaj progresigo de la ideoj al kiuj ili sin dediĉis, kaj preskaŭ ĉiam plenumas sian pluan kunagadon sub la formo de postlasitaj libroj. Simile impresa estas la frazo per kiu finiĝas la Nekrasova prologo al *Eŭgeno Onegin*. En kruelaj doloroj Puŝkin mortis la 29-an de januaro 1837. "Liaj lastaj vortoj estis direktitaj al la librobretoj; li diris, 'Adiaŭ, amikoj!'"

Jes ja. Libroj! Amikoj!

Multfoje nia fiero, nia vanta malhumilo igas nin koleraĵoj kontraŭ iuj el la majstroj. Sed al ili oni ĉiam povas reveni sen timo pri riproĉo, ĉar libro ne bezonas pardonon, kaj denove ili kantas, parolas al ni sen acida humoro, sen malŝato. Kaj se ni denove ne volas kunkanti, kunparoli, ni povas ilin flankenmeti sen posta altrudo, plendo

aŭ protesto. Ili atendas nin multajn jarojn kaj se ni okaze remalfermas ilin, tie same helpema estas la sama voĉo, preta diri al ni sian sensanĝan kanton. Jen la superhoma forto de la libro!

Dum tiu mia pensoiro jen tintis en mia memoro, ke hispanlingve José Enrique Rodó, urugvajna verkisto, verve envortigis la fatan povon de la libro. Jen, tre parafraze, kelkaj el la ideoj bildoj de Rodó.

Jen ekzistas libro, kiu naskas revoluciojn; jen libro, kiu gvidas amasojn; jen kiu pilorie senmaskigas tiranojn; jen kiu elvokas kaj restarigas mortajn aĵojn; jen kiu publikigas nekonatajn mizerojn; jen kiu estigas aŭ revivigas naciojn; jen kiu eksterenigas mistere kaŝitajn trezorojn; jen kiu forigas fantomojn kaj melankoliojn; jen kiu al la altaroj levas novajn diojn.

Ekzistas libro, kiu, endormiĝinte kiel giganto en letargio sub polvo de jarcentoj, iam subite releviĝas kaj per la bato de siaj piedoj tremigas la mondon. Ekzistas libro, kie daŭre sin vidigas la estonteco, la ideo el kiu vekigis nova vivo, estiĝos movo, varmo, ŝtono. Ekzistas libro, kiu aliĝas laŭ la sinsekvo de la generacioj, senmorte efike taŭga kaj tamen neniam al si identa; libro, pri kiu oni povas sin demandi: "Kion sentos, ĝin legante, la homoj de venontaj jarcentoj?"

Mi revenas al la Zamenhofa kreaĵo, al mia kara Esperante vestita *Eŭgeno Onegin*. Memoroj pri iamaj eventoj, pri vigliĝo kaj ekstagnado de Esperanto en Sovetio, sin arigas en mia animo. En Esperantujo la bravaj samideanoj de la iama Sovetrespublikara Esperantista Unio, jam for de ties estigaj kaj tempaj cirkonstancoj, ja daŭre kunagadas—per la nepereemo de ĉiu inde kaj zorge plenumita laboro—al la progresigo de nia afero.

En la loĝlando de la subskribinto tiun aferon ja malhelpas, baras, nekomprenemo kaj indiferento—najbaraj al kontraŭstaro, kaj iafaje eĉ tia—de aŭtoritatuloj; sed la sentimento de unuopuloj ĝin kulturas kaj ame vartas ĝin malgraŭ ĉio.

*Do ĉu forgesos mi nenie
vin eĉ en plej dezerta land'?*

Nun vi kie?

*Nun kie paŝas via pland'?**

Karaj iamaj gelernantoj ĉe stacio Haĉmas! Gvidu nin prefere la poezia suno de la espero, ol la ekzakta mapo de argumentado ĝis rezignaj marĉoj! La sama suno prilumas nin!

* *Eŭgeno Onegin*, ĉap. 1/XXXI.

Johano Papini :

LA OBSERVADOJ DE DOKTORO ĈU

Mia maljuna ĉina amiko Doktoro Ĉu revenis en Eŭropon antaŭ kelkaj monatoj. Mi lin renkontis en Venecio en la frua parto de Septembro, sin apogantan kontraŭ pilastron de la Novaj Palacoj de la Prokuristoj kaj sidantan antaŭ grandega tekruĉo similanta arĝentan kranion. Mi ne tuj rekonis lin ĉar pli ol tridek jaroj pasis de kiam ni kune interparolis lastfoje en librejo de la strato Tornabuoni en Florenco pri nova itala traduko de la *Tao-te-king*. Tamen li, kun la malgrandaj okuloj embuskantaj malantaŭ siaj grandaj okulvitroj, rekonis kaj alvokis min. D-ro Ĉu estis perdinta la glatan rondecon de junaĝo kaj sur lia vizaĝo, aspektanta kiel mola pergameno, jam estis gravuritaj la unuaj ideografiaj signoj de la maljunaĝo. Lia vizaĝo tamen estis hela, kiel iam, je timema rideto de maliceta bonkoreco.

D-ro Ĉu invitis min eksidi ĉe lia tableto kaj ni komencis rakontadi, reciproke nin interrompante, niajn respektivajn historiojn de la ĵus pasintaj jaroj. Senpacienca mi tamen estis, alveni al la lasta ĉapitro de niaj travivaĵoj, por fari al li la demandon kiu plej pike urĝis sur miaj lipoj. "Kian impreson faris al vi Eŭropo post tiom da jaroj de foresto?"

Li respondis per sia bonema azia rideto. "Mi efektive ne volus riski doni ĝeneralan prijuĝon pri la eŭropa malsano post tiel mallonga loĝado ĉi tie. Mi tamen iomete observadis pri specialaj aspektoj de via vivo, kaj se vi volas, mi povas provi vian paciencon per opinio."

"Forlasu la komplimentojn; mi aŭskultas..."

"La unua rimarkigo estas la jena: ŝajnas al mi, ke dum la lastaj tempoj okazis rimarkebla transiro en la homa spirita anatomio. Malsupren..."

"Spirita anatomio! Mi ne komprenas."

"Atendu momenton. Vi komprenos. Ni ĉinoj kredas, ke la homa korpo estas dividebla per imaga horizontala linio pasanta tra la umbiliko. La supraj partoj estas la plej noblaj, la malsupraj la malplej noblaj. Mallonge, supre troviĝas la kapo, sidejo de la penso, kaj la brusto, sidejo de la sento. Malsupre, kontraŭe troviĝas la partoj pri kiuj oni hontas, kune kun la du ostaj kaj muskolaj kolonoj, kiuj kutime servas al la marŝado.

"Mi konstatas, ke antaŭ duonjarcento, eĉ pli proksime—ni diru ĝis la unua mondmilito—la scivolo, la honoro kaj la gloro de la homoj rilatis al la pli altaj partoj de la korpo. La homoj pasiĝis kaj ekscitiĝis ĉefe pri tio, kio eliris el la cerbo aŭ la koro: nova filozofia teorio, nova

muzika verko, nova poezia revelacio, nova pentra skolo k.t.p. Ĉiuj, eĉ la vulgarularo, sekvis, ĉu pro entuziasmo, ĉu pro nura modo, la spiritaĵojn elvolviĝojn kaj eltrovojn. Ekzemple la unua prezento de tragedio, publikigo de grava libro, elokvento de oratoro, la sorto de ĉefverko, ĉio vekis kunsenton aŭ malkunsenton, diskutadojn kaj komentojn, elfluon de populareco aŭ furiozajn polemikojn.

"Sed hodiaŭ ĉio ŝanĝiĝis. Profesoro Freud unuflanke kaj romanisto Lawrence aliflanke transiĝis la centron de la vivo pli malsupren en la tiel nomitajn erotikajn zonojn, kaj ili triumfiĝis la seksan superecon. Sed la homamaso iris eĉ pli malsupren! Laŭ ili estas aplaŭdindaj kaj admirindaj nur la kruraj kaj piedaj lertoj; kruroj de artistino en kino, de dancistino en la teatro, de futbalisto en stadiono, de kuristoj en stratoj aŭ sur la kurejo... La febra atendo kaj la malavara famo, kiuj antaŭe akompanis la muzikistojn, la poetojn, la filozofojn, la pentristojn kaj la mastrojn de la ideo kaj la vorto, mallonge ĉiujn, kiuj lumigis la mensojn kaj konsolis la korojn per la belo kaj la vero, hodiaŭ ĉirkaŭas preskaŭ nur tiujn, kiuj scias pli bone movi la krurojn, ĉu por stimuli la viran lascivan humoron, ĉu por doni al la piedpilko terurajn frapojn..."

"Ĉi tiu simbola translokiĝo en la homa anatomio ŝajnas al mi unu el la plej signifoplenaj ŝanĝoj observeblaj en Eŭropo nuntempe. Ĉe homoj kaj popoloj, kiuj fieras pri sia *plej alta civilizo* la forto kaj la formo de la malsuperaj membroj estas pli glorataj ol la mensa potenco. La piedistoj superas la cerbistojn!"

"Necesas" mi respondis, "serĉi la kaŭzojn de ĉi tiu fenomeno."

"Nu, ni parolos alitempe pri tio," diris D-ro Ĉu. "Mi tamen volus hodiaŭ tuŝi ankaŭ alian aspekton de la okcidentaj homoj, kiun mi observis en la lastaj monatoj. Antaŭ 1914 troviĝis en via lando kelkaj homoj, kiuj volis atingi monon sen penado, per bonŝanca trafo. La fenomeno tamen estis limigita kaj modesta. Tio estis la ludistoj de la ŝtatloterio, la vetistoj ĉe la ĉevalkuroj, la klientoj de la hazardludejoj. Hodiaŭ la tuta vivo ŝajne estas regata de la ludoj kaj la kapricoj de la sorto. Oni sekvas de proksime kaj de malproksime piedpilkan konkuron aŭ aŭtomobilan aŭ ciklistan kuradon, ne por admiri la valoron de la atletoj kaj de la kuristoj, sed kun la espero akiri milionojn kaj fariĝi subite riĉa!"

"Oni ne plu vetas nur pri galopantaj kaj trotantaj kvarpieduloj, sed ankaŭ dupieduloj sin prezentas kiel kandidatojn en la afero. Monpruntanto al la ŝtato esperas gajni grandan

premion; radio-abonanto estas allogata per matenaj, vesperaj kaj noktaj muzikoj pro la eblo akiri aŭtomobilon aŭ paketon da monbiletoj. Industriistoj kaj komercistoj profitas ĉi tiun emon, ĉi tiun kreskantan pasion al la riĉaĵoj pluvontaj el la ĉielo. Oni rekomendas likvoron ne pro ĝiaj kvalitoj sed tial, ke ĝi povos havigi al la aĉetanto utilan aŭtomobilon aŭ senpagan ferion. Oni aĉetas dentsapon ne pro ĝia boneco, sed ĉar oni ĉiumonate povos gajni kvarĉambran loĝejon aŭ kolosan bankĉekon.

Alitempe la homoj taksis valora la konstantan laboron kaj la ŝparon por la plenumo de tiaj fantaziaj revoj. Hodiaŭ preskaŭ ĉiuj fidis al la hazardo. Miliono hazarde gajnita ŝajnas al la homoj pli grandpreza ol afero kolektita pacience per la intelekto aŭ per la laboro. La idealo estas, riĉiĝi sen laboro, sen peno. Ĉu mirige do estas, se en la tuta Eŭropo multobligas grandstilaj rabistoj, se la nacia pensmaniero estas, akiri kiel eble plej multon kontraŭ nenio? Ĉi tiu kurioza metamorfozo en la sinteno de la grandskala ekonomiisto estas nur reflekto de la milionoj, kiuj riskas siajn centojn da liroj."

La suno estis malrapide subiranta malantaŭ la kupolon de la baziliko de S-ta Marko kaj la kolomboj estis ĉesigintaj siajn flugetojn. D-ro Ĉu, paginte sian teon, leviĝis kaj kun mi iris por serĉi restoracion, babilante pri intelektaj temoj, pri la *Mo-ti*'a sistemo kaj pri la poezio de la *Tang*'a epoko

*Kun afabla permeso de la aŭtoro
tradukis Mario Simondetti.*

Brendon Clark :

Renkonto

*Ĉu vi eble partoprenas,
Kiam mi renkontas vin korrave,
Tiun ŝokon de finita serĉo, kaj momente
Kredas, ke nenio krom aero vin subtenas ?
Aŭ—ĉu vi indiferece
Juĝas min—kaj tiel prave !—
Malspritulo, kies troigardo jam vin ĝenas ?*

Pri neologismoj

S-ro Johannes May, en Saar atentigas pri la jena peco en *Kataluna Antologio* : "Ni forte evitas neologismojn, novajn afiksojn kaj ĝenerale ĉiajn novaĵojn de reformemuloj. Ni sincere kredas, ke la *Fundamenta Esperanto* jam posedas tian kolosan riĉecon, ke al talenta uzanto de la lingvo estas nenecese ĉerpi el aliaj fontoj. Tiuj, kiuj trovas grandajn mankojn en nia lingvo, plejofte montras nur proprajn mankojn; mankon de studo, mankon de praktiko, mankon de talento. Ni diras nian opinion kun kruda sincereco, eĉ riskante, ke oni nomu nin pedantoj."

(Spirito kaj Materio : *daŭrigo de la sekvanta paĝo*)

scias pri kio ili parolas. Sed nun la fiziko faras la gravegan deklaron : "Ni ne scias, kio estas la materio, sed ni trovis, ke ni ne povas ekspliki ĝin se ne per la termino *energio*. Kaj la filozof-teologo diras : "Ni efektive ne scias kio estas la spirito; ni neniam renkontas ĝin krom en intima kunligo kun materiaj korpoj; sed ĝi ŝajne estas io, kio energiigas la korpojn." La abismo inter la materio kaj la spirito mallarĝiĝis. Mi ne sugestas, ke la materio kaj la spirito estas identaj; sed oni asertas unufanke, ke la materio estas esence energio, kaj aliflanke, ke la spirito estas ia subtila speco de energio. Tio estas rimarkinda alproksimiĝo.

La nova fiziko definitive kondukas nin en direkto al iu nova formo de filozofia idealismo. La esploroj pri la konsisto de la materio faritaj en la interno de la atomo sekvigas la konkludon, ke la materio ne estas inertaĵo, sed estas plena de energio kaj multe pli parenca al la spirito, ol oni antaŭe kredis. Eddington eldiris ĉi tiun juĝon : "La ŝtofo de la mondo estas mens-ŝtofo". Ĉi tie estas interese rimarki, kiel iuj fizikistoj komencas citi la unuajn vortojn de la evangelio laŭ Sankta Johano : "En la komenco estis la *Vorto*." Ili verŝajne komencas iom konsenti kun la filozofoj-teologoj, kiuj klarigas la originon de la materio per tio, ke la Dia Principo aŭ Spirito evidentigis sin en formo materia. Verŝajne nur tiel ili povas ekspliki la senĉesan aktivecon de tio, kion ni nomas la materio, kaj la mirindan ritmon de ĝia pulsado.

John S. Dinwoodie :

Animsoifo

Mi soifis komprenemon
Por ekspliki la problemon
De la celo kaj signifo
De la vivo. La soifo
Longe, longe min turmentis . . .
La ĉielo nur silentis.

Sur la teron mi min ĵetis,
Mian vangon tien metis,
Kie nudis la terbrusto
Sub ombranta laŭr-arbusto :
Eble estus, ke la humo
Flustros pri sopirplenumo.

Tiam prenis la patrino
La infanon al la sino.
La venteto lulmurmuris,
Kaj folioj lulsusuris ;
Pasis for la animŝtormo,
Kaj min trafis paca dormo.

La h
li sufiĉ
ĉirkaŭa
ekzista
nevide
objekt
ankaŭ
ventoj
animal
nature
ĉielo, s
potens
divers
religio
pacigi
regi ili

Kur
scienco
al la f
kaj ĉia
sin nur
materio
maller
propor
el la
atomo
hodiaŭ
lastate
kaj ne
diri, k
fiziko :

Sur
Materi
inkluzi
povas
kompl
fortoj
fortoj
kompl
instink
kio est
provas
astrofi
iliaj n
korpe
liaj p
estas
da ate
ni sent
la teo
subter

Tan
renver
sur la

J. S. Dinwoodie :

SPIRITO KAJ MATERIO

La homo estas laŭnature sciavida estaĵo. Kiam li sufiĉe evoluis por teorie rezoni pri si kaj pri la ĉirkaŭa mondo, li kredis konstati, ke en la mondo ekzistas du specoj de objektoj—la videblaj kaj la nevideblaj. Ekzistis ŝtonoj, arboj kaj ĉiaspecaj objektoj, kiujn li povis vidi kaj tuŝi; sed ekzistis ankaŭ fortoj nevideblaj, kiuj evidentigis sin en la ventoj, en la kreskado de la plantoj kaj la animaloj, kaj en la menso de la homo mem. Li nature supozis, ke estas spiritoj en la tero kaj la ĉielo, similaj al lia propra spirito. Kiel vasta kaj potenca estis ĉi tiu ideo, oni povas konstati per la diversaj formoj de animismo, tiu primitiva religio, laŭ kiu la ĉefa vivcelo de la homo estas, pacigi tiujn nevideblajn spiritojn kaj, se eble, regi ilin.

Kun la paso de la jaroj tamen la religio kaj la scienco disiĝis kaj ekiris apartajn vojojn. Lasante al la filozofo kaj la teologo la nevideblan regnon kaj ĉian rezonadon pri ĝi, la sciencisto prenis sur sin nur la ekzamenadon kaj analizadon de objektoj materiaj. La fruaj provoj kompreneble estis tre mallerte faritaj sed fine la Greko Democritus proponis la teorion, ke ĉiuj materiaj objektoj estas el la sama ŝtofo kaj konsistas el malgrandaj atomoj. Kaj jen naskiĝis tiu fama kaj por ni hodiaŭ tiel signifoplena vorto Atomo, kiu ĝis lastatempe signifis la fundamentan, nedetruieblan kaj nedivideblan eron de la materio. Oni povas diri, ke post la Grekoj ĝis la moderna tempo, la fiziko apenaŭ pluen progresis.

Sur la fundamento de la atomo konstruiĝis la Materialismo, la kredo, ke la tuta mondo, inkluzive de la vivantaj estaĵoj kaj la homo mem, povas esti rigardataj kiel nenio alia ol granda komplekso de atomoj aktivigita de mekanikaj fortoj. Oni ne povas nei, ke pure mekanikaj fortoj povas produkti tre strangajn kaj kompleksajn rezultojn, tamen la ordinara homo instinkte sentas, ke la materialismo asertas ion, kio estas tute nekredbla. Kiam la materialisto provas kredi al ni, ke ne nur ĉiuj astroj kaj astrosistemoj, sed ankaŭ ĉiuj vivantaj estaĵoj kun iliaj mirindaj instinktoj, kaj la homo mem, kiel korpe tiel spirite, kun ĉiuj liaj pensoj kaj aspiroj, liaj poezio kaj muziko, liaj civilizo kaj religio, estas nenio krom la produkto de konfuza amaso da atomoj senorde kunĵetitaj de mekanikaj fortoj, ni sentas, ke nia kredemo estas trompata. Tamen la teorio estas alloge simpla kaj ricevis grandan subtenon.

Tamen nun venis neatendita kaj drameca renversigo. La materialisto fondis sian kredon sur la nedetruiebla solideco de la materio. "En

la komenco estis la Atomo," estis la unua vorto en lia Biblio. Sur la solida roko de la atomo li konstruis sian tutan sistemon. Li fidis je la fiziko, sed nun la fiziko transiris al la malamiko, aŭ almenaŭ proklamis sin neŭtrala. "Kion utilas paroli pri la materialismo," diris Sir Arthur Eddington, "kiam oni ne scias, kio estas la materio?" Kaj simile Profesoro Whitehead: "Kion valoras paroli pri mekanika klarigo, kiam oni ne scias, kion signifas mekaniko?"

Ĉi tiu revolucio komenciĝis per la epokfaranta eltrovo, ke la atomo povas esti disfrakasata. Sir J. J. Thomson, kies nomo estos por ĉiam asociata kun ĉi tiu eltrovo, sukcese frakasis la ĝis tiam nedividitan atomon kaj pruvis, ke la fragmentoj defrakasitaj estas el la sama speco, negative el kiaspeca atomo ili venis. Tiuj fragmentoj, se oni povas tiel nomi ilin, pruviĝis nenio alia, ol etaj elektraj fajretoj, kaj laŭe oni nomis ilin elektronoj.

Ĉi tiu eltrovo naskis la koncepton pri la vulgare nomita *atoma energio*, energio kiu montriĝis tiel detrua ĉe Nagasaki, sed kiu espereble povos esti utiligata por la bono de la homaro. La grava kaj iom timiga afero estas, ke la atoma energio ekestas tiam, kiam la materio ĉesas esti materio. Kaj ĉi tiu profunda eltrovo, kune kun la teorioj de Planck (la kvanto-teorio) kaj de Heisenberg, rezultis en tio, ke la fizikisto nun trovas, ke ekzistas iuj materiaĵoj, kiujn li ne povas mezuri per materiaj rimedoj. "Kaj tio," diras kemiisto D-ro R. S. Cahn, "kiom mi povas taksi ĝin, signifas, ke moderna fizikisto ne povas esti materialisto." La ĝisnuna materialismo estas malnovmoda; ĝi devos esti tute rekonstruata laŭ la eltrovoj de la nova fiziko, kaj post tia rekonstruo oni eble ne povos rekonstrui ĝin kiel materialismon.

La unuanima konkludo de la nova fiziko estas, ke la ŝtofo el kiu la materia mondo estas farita, povas esti difinata nur kiel energio. Ĉiaokaze la fizikisto certigas nin, ke en ĉiuj siaj esploroj li renkontas nenion krom tiuj elektraj vibroj. Ne estas lia devo klarigi, kio eble kuŝas malantaŭ ili, aŭ kio estas la kaŭzo de ilia ekapero. Tion li lasas al la filozofo-teologo. Alivorte, ŝtono estas nenio alia ol komplekso de elektraj energio, konservata en majesta ekvilibro, kun pulsado senĉesa.

Do en sia fina esenco la materio ŝajne estas multe pli etera, multe pli parenca al la spirito, ol oni ĝis nun supozis. La rilatojn inter la materio kaj la spirito oni pridiskutis dum jarcentoj. Generale oni kredis ilin tute malsamaj, kaj parolante pri ili oni akceptis kiel fakton, ke ĉiuj

(daŭrigo sur p. 12)

Colin R. Smith :

“NOVA ESPERO”

Kiam mia frato kaj mi komencis nian vojaĝon de Dartmouth en Kanado al Dartmouth en Anglujo, en la 20-futa jakto *Nova Espero*, ni tute ne sciis, ke ni estas farontaj ion, kio povus kapti la imagon de la homoj tra la tuta mondo. Ni bezonis 43 tagojn kontraŭ malfavora vetero por transiri la Atlantikon kaj ŝajne, kiam ni pli kaj pli proksimiĝis al sudokcidenta Anglujo, la ekscito pligrandiĝis, ĝis fine, kiam ni alteriĝis en Dartmouth, Anglujo, la ĵurnaloj portis grandajn artikolojn kaj multajn bildojn pri la afero, kaj oni raportis nian alvenon en la filmgazetoj en ĉiu filmteatro.

Mi skribas pri tio, ne por fanfarori (la frato kaj mi neniam volas pretendi, ke ni faris ion esceptan) sed por montri kiel du tre ordinaraĵoj homoj, kiuj havis mesaĝon, subite konstatis, ke la homoj volas kaj pretas aŭskulti. Dum la pasintaj du monatoj, post nia alveno en Anglujo, ni estas tre okupitaj per prelegoj k.s. parolante pri la vojaĝo kaj—multe pli grave—pri nia plano starigi novan movadon, kiu laboros por mondpaco per federacio.

En februaro 1950 en Nova Scotia (Nova Skotujo), Kanado, komenciĝos laboro por la fondo de la unua el multaj modelaj komunumoj. La frato kaj mi kun kelkaj niaj amikoj kunigos niajn rimedojn por komenci du-tri entreprenojn. La kontribuo de mia frato kaj mi estos la boatkonstruado, kaj estis por sukcesigi tiun nian entreprenon, ke ni velis transatlantiken en *Nova Espero* por en malmultaj monatoj gajni reputacion en Kanado, kiel boatkonstruistoj, anstataŭ atendi, kiel kutime, dum multaj jaroj.

En la grupon ni de tempo al tempo akceptos novajn membrojn ĝis ni havos membraron de du, tri aŭ kvar centoj, loĝantaj kaj laborantaj kiel komunumo. Proksimume je tiu stadio la komunumo ne pligrandiĝos, sed havos la taskon starigi ankoraŭ unu komunumon aliloke. Kiam ankaŭ ĝi havos la celitan nombron, la du komunumoj starigos ankoraŭ du, kaj poste la kvar starigos ankoraŭ kvar k.t.p. Ni esperas, ke fine ni havos multajn centojn de ĉi tiaj komunumoj tra la mondo.

Pri la strukturo de la movado. Ĝi vivos laŭ la modernaj ideoj pri la rajtoj de la homo. Ni

havos membrojn de multaj landoj, rasoj kaj koloroj kaj akceptos, ke tiu, kiu estas ano de la movado, estas egale bona, kiel ĉiu alia. Ĝi estos senpolitika kaj sensekta, kvankam ni sendube havos membrojn el ĉiuj politikaj partioj kaj el la plej multaj religiaj sektoj. La movado



La Nova Espero

funkcios demokrate, kaj kiam mia frato kaj mi estos certaj, ke ĝi daŭros laŭ la ĝusta vojo per la konstitucio, ni mem forlasos rajtojn super la aliaj membroj.

Ĉar ni havos homojn de multaj landoj en la movado, necesos ke ni havu oficialan helplingvon per kiu ĉiu estos komprenata. Pro ĝiaj simpleco, sennacieco k.t.p. ni decidis, ke Esperanto devos

esti la aliĝos

Nia

1. Per

ĉiu

po

har

2. Cer

aŭ

da

3. Ku

lal

4. Re

de

ka

fa

m

Mu

sendu

mond

antaŭ

de m

regist

nacia

Ne

grand

kiam

speco

Mia

antaŭ

ŝanco

hava

daŭri

homo

nuna

helpi

gener

estos

nova

helpi

eĉ nu

povo

ĉiuj

esti la oficiala lingvo de la movado, kaj ĉiu, kiu aliĝos al ni, devos lerni Esperanton.

John S. Dinwoodie :

Niaj celoj estas :—

1. Per ekzemplo montri al la mondo, ke homoj de ĉiuj koloroj, rasoj, politikaj ideoj kaj religioj povas vivi kaj labori kune tute feliĉe, kiam ili havas la okazon.
2. Certigi, ke la voĉoj de ordinaraj homoj estos aŭdataj, postulantaj la necesajn rimedojn por daŭra paco.
3. Kunlabori kun aliaj movadoj, kiuj sincere laboras por mondpaĉo.
4. Revenigi en la mondon la esperon, ke la serio de teruraj pligrandigantaj mondmilitoj (kiuj karakterizas la nunan jarcenton) ĉesos se ni faros la necesajn paŝojn krei mandaton de la mondpopolaro, postulantantan mondregistaron.

Multaj problemoj kontraŭstaras la homaron sed sendube la plej grava estas la minaco de tria mondmilito. Ni devos solvi ĉi tiun problemon antaŭ ol ni povos solvi eĉ la kreskantan problemon de manko de nutraĵoj. Ni devas fondi mondregistaron, kiu havos certajn potencojn super la naciaj registaroj, por ke ni forigu mondmiliton.

Ne estos facile solvi ĉi tiun problemon, la plej grandan en la tuta historio de la homaro; sed kiam ĝi estos solvita la gloraj eblecoj antaŭ nia speco estos senlimaj.

Mia frato kaj mi komencis labori por nia plano antaŭ dek jaroj kaj ni opinias, ke ĝi havas bonan ŝancon de sukceso. Se oni povus montri, ke ĝi havas nur unu ŝancon en miliono, ni tamen daŭrigus, ĉar konsidere al la multaj bilionoj da homoj ankoraŭ venontaj en la mondon—se la nuna generacio agos—la plej malgranda ŝanco helpi meritas nian konsideron. Se la nuna generacio rifuzas agi, estas tute kredeble, ke ne estos pluaj generacioj. Ni ne pretendas, ke la nova movado *Nova Espero* faros pli multe ol helpi al la celoj de la tutmonda movado laboranta eĉ nun por mondfederacio, la federacio kiu sole povos alvenigi la daŭran mondpacon al kiu ni ĉiuj sopiras.

SYNNØVE SOLBAKKEN

Bjørnstjerne Bjørnson

Plaĉa Norvega rakonto tradukita de
Edith kaj Aŭgust Weide

23. 3p. aŭ 9 rpk. afrankite

Mendu ĉe U.E.A.

Soneto

Hodiaŭ staris mi sur alta monto ;
Flagretis la unua sunradio
Fajrruĝe sur la fora horizonto :
Eksonis matenpreĝa melodio
De la vaneloj. La dormanta mondo
Ektremis en vekiĝa konvulsio.
Katenis min per koroprema honto
La dolĉa naturhōra litanio,
Ĉar en animo mia nestis duboj,
Kaj blinde kontraŭ Dio mi ribelis.
Sed kiam la birdkanto laŭte ŝvelis,
Forvelkis ĉiuj nigraj spiritnuboj.
Mi dankis Dion, ke mi tie staris,
Kie la birdoj laŭdon al Li faris.

Rido sanigas

Bonvivulo, malesperante pri la kvalito de angla biero, eriris trinkejon tuj post atako de gangsteroj, kiuj prirabis la homojn tie, kaj perfortis du homojn, kiuj rezistis. Vidante la du homojn sternitajn sur la planko, la enveninto ekĝojis kaj vokis al la servisto : "La saman trinkon, kiun tiuj du havis, mi petas !"

* * *

Motociklisto promenis amikon sur la posta selo de sia maŝino. Pro la forta blovo la amiko turnis la jakon tiel, ke la butonoj estis ĉe la dorso. La motociklisto subite konstatis, ke la amiko jam ne estas kun li kaj, turninte la maŝinon, reiris laŭ la vojo. Li baldaŭ trovis aron de homoj ĉirkaŭ lia amiko, kuŝanta sur la tero. Li demandis, "Ĉu estas bone al li" ? Unu apudstaranto respondis, "Ne. De kiam ni turnis lian vizaĝon al la fronto, li ne plu parolas !"

* * *

Feliĉa patro diris al sia juna filo : "Ĉu vi volus vidi la novan fratinton, kiun alportis al vi la cikonio ?" La fileto respondis : "Mi prefere vidus la cikonion !"

* * *

Viro renkontis surstrate amikon kaj plendis pri sia reŭmatismo. La amiko diris : "Ho, mi estas feliĉa. Mia edzino bone masaĝis min per speciala ŝmiraĵo, kiun ŝi havas kaj tute kuracis min. Vi devas provi ĝin." La amiko kore dankis lin kaj diris : "Mi provos jam tuj. Donu al mi vian adreson !"

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo
OFICIALA INFORMILO

N-ro 222

3-an de Decembro 1949

NOVA PERANTO

Kubo. Kuba Esperanto-Asocio, Apartado 1324, Habana.

NOVAJ DELEGITOJ

Brazilo

Limoeiro do Norte. FD (Komerco) : O. Odilio da Silva, Rua Cel. Serafim 24. Tel : 11.
Niterói. FD (Statistiko) : D-ro M. Ritter Nunes, Rua General Osório 87—casa 3. Tel : 4859.
Rio de Janeiro. D : F. Ferreira da Costa Filho, Rua Barão de Cotegipe 583-X.
 VD : G. Soares de Araujo, Rua Alfândega 79—2 and. Tel : 43-4773.
 FD (Ekonomio) : D-ro C. Domingues, Rua Alvaro Alvim 27 ap. 61. Tel : 22-5110.
 FD (Juro) : M. Timponi, Rua Carlos de Vasconcelos 57—Tijuca. Tel : 480940.
 FD (Literaturo) : J. Moreira, Rua Sant'Ana 180—3, apt. 5. Tel : 32-2664.

Britujo

Blackburn. D : F-ino E. Ryden, 62, Shadsworth Road.
Seaham. D : F-ino C. W. Hudson, 9, Camden Square. Tel : 3235.
Sheringham. D : S-ino R. M. Dhonau, Avondale, Cromer Road.

Hispanujo

Barcelona. FD (Komerco—ŝtofoj) : F. Alsina, Calle San Augustin 6 pral.
Sevilla. D : R. Fiol Paredes, Baños 66. Tel : 22.158.
 VD : J. M. Arias de Reyna, Barzola 10. Tel : 22915.

Pollando

Bielsko. VD : F. Walas, ul. Michiewicza 18.
Sopot. FD (Geografio) : B. Palczynski, W.S.H.M., str. Armil Czerwonej 101.

Usono

El Paso (Texas). D : H. S. Schroepfel, 652, Mauer Drive. Tel : 9-8255.
 FD (Kemio—Polarizo) : La D.

ŜANĜOJ

Britujo

Croydon. D : nova adreso : 8, Hartland Way.

Ĉeĥoslovakujo

Plzen. D : vakas pro morto.
Usti nad Labem. FD (PTT) : vakas pro morto.

Germanujo

Regensburg. D : nova adreso : Luitpoldstr. 15.

Hispanujo

Alcira. D : vakas pro morto.

Italujo

Roma. FD (Turismo) : nova adreso : Casella postale 27, Roma-Appio.

Izraelo

Reĥovot. D : nova adreso : Newei Jehuda.

Nederlando

Leeuwarden. FD (Bankaferoj) : nova adreso : Leeuwerikstraat 78.

Svislando

Aarau. D : vakas pro transloĝigo.
St. Gallen. FD (Instruado) : vakas pro transloĝigo.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

S-ro S. Sundin, Växjö, Svedujo.
 S-ro J. Saldanha Carreira, Lisboa, Portugalujo.

PATRONOJ 1949

17. S-ro J. H. Murray, Dearborn, Mich., Usono.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1949

365. S-ro B. R. Zeiner, Barry, Kimrujo.

DONACOJ. J. Halloran 2ŝ. 6p., E. B. Johnson 7ŝ. 6p., H. T. Bailey 2ŝ. 6p., Bondeziranto 11ŝ., C. J. S. Kitching 7ŝ. 6p., S-ino H. Amelin 11ŝ. 5p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la 30a de Novembro 1949, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Novembro 1948 :

	1948	1949
Asociaj membroj ..	10938	7878
Individuaj membroj :		
Mj ..	976	851
MA ..	4529	4372
MS ..	345	364
Patronoj ..	21	17
DM ..	172	189
HM ..	56	60
	6099	5853
	17037	13731

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

REVUOJ MENDEBLAJ ĈE U.E.A.

Amerika Esperantisto	7ŝ. 6p.
Esperantobladet (Norvegujo)	4ŝ.
Franca Esperantisto	4ŝ.
Heroldo de Esperanto	17ŝ. 6p.
Internacia Kulturo	12ŝ.
La Praktiko	12ŝ.
La Suda Stelo (Jugoslavujo)	6ŝ.
Malgranda Revuo	8ŝ. 6p.
Monda Tribuno	8ŝ.
Svenska Esperanto-Tidningen	8ŝ. 4p.
Svisa Espero	7ŝ.
Voĉo de Islando	5ŝ.

Literatura Mondo ne aperos en 1950

Frat
 Franci
 deziras
 garden
 Esti
 fari
 elmigri
 ŝia por
 fraŭlo,
 São Pa
 Ne-k
 kredo,
 Inform
 Nederl
 Inter
 de via
 kvanto
 Prop
 sendos
 kun ka
 J. M. F
 Gean
 koresp
 44, Ne
 Inter
 Delfi E
 15 E
 gesami
 Poulse
 Leter
 Espera
 nomb
 Espera
 Danlat
 Iust
 Tito d
 Santos
 22-je
 eksteri
 11, To
 Kom
 ekzami
 Ni sem
 ĉe U.E
 Leter
 Fako
 Barcel
 Fran
 koresp
 skribu
 S-ro
 Austral
 Fr. J
 U.E.A.
 la tuj
 respon
 La E
 1950
 gesepe
 ŝtatis
 Rhomg

ANONCETOJ

Kosto : du pecoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondekupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Fraŭlo Raymond Furon, Chemin des Châlets, Angers, Francujo, 29-jara fruktproduktisto, legomproduktisto, deziras korespondi tutmonde kun terkulturist(in)o, gardenist(in)o. Nepre respondos.

Estimataj samideanoj en la tuta mondo! Kiu volas fari esperantan geedziĝon kun nuntempa hungara elmigranto? De tiu mi volonte atendas respondon kun ŝia portreto al mia adreso. Emeriko Szilágyi, 42-jaraĝa fraŭlo, seruristo, Vila Pompeia, Rua Padre Chico 198, São Paulo, Brazilo. Anonco serioza.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika kredo, povas ricevi ilin senpage per la Internacia Katolika Informejo. Sekretariejo: Fraterhuis, Loonopzand (N.Br.), Nederlando.

Interŝanĝo Skandinavio—Eŭropo. Sendu poŝtmarkojn de via lando; mi sendos skandinavajn je sama valoro aŭ kvanto. Herbert Levi, Esplanaden 21, Kalmár, Svedujo.

Propagandvaloran faldfolion mi havigos al ĉiu, kiu sendos al mi por propagando ilustritan poŝtkarton, se eble kun kelkaj vortoj; aŭ leteron. Veenstra, komercisto, J. M. Kemperstraat 28, Amsterdam, Nederlando.

Geanoj de nove starigita Esperantista klubo deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Adreso: A. de Vries, Bozum 44, Nederlando.

Interŝanĝus librojn pri stenografio, post interkonsento, Delfi Dalmau, Lauria 98, Barcelona, Hispanujo.

15 Esp.-komencantoj (18-50j.) deziras korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo. Skribu al Thomas Poulsen, Torvet 4, Give, Danujo.

Letervespero en Fredericia. En februaro Fredericia Esperanto-Klubo okazigos letervesperon. Skribu multnombre! Respondo garantiata. Dankegon. Fredericia Esperanto-Klubo, ĉe Havepladsvvej 136, Fredericia, Danlando.

Ilustritajn poŝtkartojn (sen koverto!) interŝanĝas S-ro Tito de Barros Jr., farmaciisto, Av. Epitácio Pessoa 28, Santos, Est. S. Paulo, Brazilo.

22-jara samideano, komencanto, deziras korespondi kun eksterlandanoj tutmonde. Merlo Mikelo, Corso Brescia 11, Torino, Italujo.

Kongreso en Bournemouth 1949. Ni disponas pri kelkaj ekzempleroj de la kongresa libro, 90-paĝa historia libro. Ni sendos unu ekz. kontraŭ 1 ŝil. angla aŭ 4 rpk. Mendu ĉe U.E.A., Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

Letervesperon aranĝos la 15-an de Februaro la Esperanta Fako de "Lingua Club", str. Buensuceso 1, Manresa, Barcelona, Hispanujo. Certe respondos.

Franca 25-jara fraŭlo, lingvoinstruisto, deziras korespondi tutmonde. Ricevos tujan respondon ĉiu skribinto. Daniel Luez, Lycée, Laon (Aisne), Francujo.

S-ro E. F. Stephens, Box 67, Queenstown, Tasmania, Aŭstralio, deziras korespondi kun dentistoj alilandaj.

Fr. J. Slegers, konsulo de I.K.U.E. kaj fakdelegito de U.E.A., deziras korespondi letere kaj poŝtkarte ilustr. kun la tuta mondo. Prefere kun perfektuloj. Garantias respondon. Locomotiefstraat 36, Eindhoven, Nederlando.

La Esperanto-Societo Rheinhausen aranĝos en Marto 1950 letervesperon. Kiu deziras korespondadon kun geesperantistoj inter 13 kaj 45-jaraj (inter ili ankaŭ filatelistoj) skribu al Willi Nitsch, (22a) Rheinhausen, Rheingoldstrasse 33, Brita Zono, Germanujo.

Antonio Sidrach, Provenza 37, 5, 1a, Barcelona, Hispanujo, sendos 25-30 stampitajn malsimilajn hispanajn poŝtmarkojn interŝanĝe kontraŭ la sama kvanto el via lando.

Galvanizitan pikildraton, ladajaron deziras eksporti (speciale Sudameriken) Esperanto-Komerco-Servo, 98 rue Casimir-Delavigne, Le Havre, Francujo.

Letervespero. Esperanto-kongreso, 1 allée Pigny, Le Havre, Francujo.

Atentu filatelistoj! Ĉu vi deziras svedajn pm.? Mi volonte interŝanĝas kontraŭ aero-pm. de via lando. S-ro Nisse Österholm, Forsbro, Järna, Svedujo.

Mi deziras interŝanĝi fotografiaĵojn de dombestoj kaj de pejzaĝoj aŭ vidajkartoj en la tuta mondo. Mi antaŭe dankas. Josef Havel, Libňatov 117, p.p.Upice, Ĉeĥoslovakujo.

S-ro Robles, José Valero 35, Sabadell, Hispanujo deziras korespondi kaj interŝanĝi pm.

Svedujo: Sinjoro Åke Bengtsson, Östra Anåsgatan 11, Mölndal. Mi estas gaja bakisto, kiu volonte interŝanĝos p.k., fotografiaĵojn kaj leterojn. Mi respondos al ĉiuj.

Letervesperon aranĝos la 7-an de Aprilo 1950 la Esperanto-Klubo ĉe la Y.M.C.A., Kajro. La skribaĵojn bonvolu adresi al S-ro Nassif Isaac, P.K.350, Kajro, Egiptujo. Certe ĉiu ricevos respondon.

Ĉefdelegito por Pollando dankas Del. en Sosnowiec, D-ron A. Ingster, pro sindona helpo por du malfeliĉaj UEA-anoj.

Emajlan E-insignon aŭ kaŭĉukan varbilon kontraŭ 2 rpk. aŭ 300 uzitaj pm. Reciproke memoriga pm.-afranko. Esperanto Kunert, Gundelfingen (Donau), Germanujo.

Kun tuta mondo deziras interesan korespondadon 24-jara fraŭlino. Respondos certe. F-ino Wanda Jurkiewicz, Nowomiejska 11 m. 6, Łódź, Polujo.

Se vi deziras ekkoni la naturon de ISLANDO, la islandan popolon, kaj ĝian literaturon, abonu la novan, bele ilustritan Esperanto-gazeton

VOĈO DE ISLANDO

Jara abono kostas nur 5 ŝil.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Herongate, Rickmansworth, Herts.
Anglujo

Nova E.P.C.-libro
Praktika libro por la praktika homo
KOMERCAJ LETEROJ

de

C. A. Pruissen

Ci tiu nova verko estas pli ol gvidilo al la komerca korespondo. Ĝi instruas pri multaj fakoj de la internacia trafiko, kaj estas natura elvolviĝo en la komerca literaturo.
Nepre havinda, eĉ por la nekomercisto

Prezo 2 ŝil., afranko 2p., aŭ 9 poŝtaj respondkuponoj

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe enlanda libroservo aŭ ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

SOMERA UNIVERSITATO

(Malmö 1948)

ENHAVO

Enkonduko	-	-	-	-	-	<i>Rektoro Karl Söderberg, Svedujo</i>
La laponoj kiel kultura popolo	-	-	-	-	-	<i>Profesoro B. Collinder</i>
La kimraj artofestoj	-	-	-	-	-	<i>R. Rossetti</i>
El la mirinda naturo	-	-	-	-	-	<i>C. Stöp-Bowitz</i>
Astronomiaj sensacioj	-	-	-	-	-	<i>Profesoro K. Lundmark</i>
Ĉefprincipoj de la nuntempa internacia juro	-	-	-	-	-	<i>Profesoro D-ro Ivo Lapenna</i>
El la fronto kontraŭ la malamikoj de la kulturplantoj	-	-	-	-	-	<i>D-ro P. Neergaard</i>
La kalevala kulturo	-	-	-	-	-	<i>Vilho Setälä</i>
Pri la sveda koopera movado	-	-	-	-	-	<i>Rektoro S. A. Stahre</i>
Du svedaj humoristoj kaj unu hungaro	-	-	-	-	-	<i>F. Szilagyí</i>

La libro enhavas la tekstojn de la prelegoj en Malmö

Prezo 4 ŝil. Afranko 2p.
(17 respondkuponoj)

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo